

esperanto

NOVEMBRO 1990 • 83-A JARO • N-RO 1019 (11)

ISSN 0014-0635



- Al azia junulara kongreso? Raporto el Seulo
- TEC lanĉas projekton de Esperanto-bibliografio
- Malantaŭ la kulisoj de la UEA-Libroservo!

Eŭropo: kune sed aparte

Enhavo

- 205 Eŭropa Esperanto-Forumo: Eĉ pli disigita ol antaŭe? (Mark Fettes)
- 207 Renkontiĝoj: Amasa intereso por SAT el oriento; Norvega "Petruška" gajnas korojn (Zlatko Tišljär); Por kultura kunlaboro inter 18 provincoj (H. M. Maitzen, Z. Tišljär); Sporta raporto
- 209 Scienca apliko: Komerca tradukprogramo haveblas (Per Tore Edler)
Rusa AIS-sesio definitive okazos (Lev Medvedev)
- 210 Edukado: Instruado al verduloj – laŭ la spuroj de Andreo Cseh? (Marianne Lund)
- 211 Junularo: Survoje al azia junulara kongreso? (Ŝibajama Ĵun'iči)
- 212 TEJO-seminario: "Marĝenoj el ĉiuj flankoj" (Anna Cimossa, Alessandro Amerio)
- 213 Honoraj Membroj de UEA: Pioniroj el tri kontinentoj
- 214 Terminologia Esperanto-Centro: Por registri niajn trezorojn (Ankica Jagnjić)
UEA havas kunlaborajn rilatojn kun ISO
- 215 Prelegantoj serĉataj por IKU
- 216 Tago de la Esperanta Libro: La kluboj estas niaj alfabetigejoj
- 217 Abonlisto de la Libroservo de UEA
- 218 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri Esperanto)
- 219 Reagoj: Ne eĉ bonintencaj mitoj (Eskil Svane; Synnöve Mynttinen); La memoro de TEJO (Anna Ritamäki); Eksonimoj kaj iredentismo (Bernard Golden); Tago ankaŭ de liriko (Francisco M. Oliveira); La unuan fojon (Reza Kheir-Khah)
- 220 Recenzoj: Ĉu aglutina aŭ . . . intertipa? (Sergej Kuznecov); Bela afrika donaco (Walter Klag); Taksi provante (Trevor Steele); Ĉu forgesigi la zorgojn? (Hans Eichhorn); Bunto, fervoro kaj talento (Bernhard Westerhoff)
- 222 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
Nekrologoj
- 223 Kion signifas TEJO por vi? (Saskia Idzerda)
- 224 Esperanto en radio

Vi trovos,

kiel kutime, trankvilajn kaj toleremajn voĉojn en niaj paĝoj. Niaj artikolantoj nek timas opiniojn nek atendas aŭtomatan konsenton. Foje ŝajnas, tamen, ke kelkaj el niaj legantoj ne ŝatas tion. Kion pensi pri asertoj, ke UEA ne plu neŭtralas pro la apero de "fanatike dekstrega" artikolo, aŭ ke per unu frazo ĝi eksplodigis sian statutan subtenon al la homaj rajtoj? Iuj ankoraŭ ne komprenas, ke la neŭtraleco konsistas el tolerado de multaj opinioj kaj ne el ilia subpremo. Kaj cetere – pli gravas agoj ol vortoj. Tio estas iom frustra konstato por redaktoro, kompreneble, kiu ankaŭ ne volas malinstigi vian promenadon tra liaj tekstoj! Tamen, se tie vi mem trovos inspiron al agado, tio kompensas ĉiujn liajn penojn kaj malbenojn. Ja abundas la invitoj al vi pri vojaĝado, instruado, organizado kaj varbado. Kaj finfine – ĉu ne ankaŭ legado estas ago?

La kovrilo: Ankoraŭ dum kelkaj monatoj UEA havos du landajn sekciojn en Germanio, kvankam la prezidantoj de GDREA (Ronald Lötsch, maldekstre) kaj GEA (Wolfgang Schwanzer) jam amike diskutas pri kunfandiĝo. Sed aliaj dividoj en "unuiganta" Eŭropo montriĝas pli obstinaj: vidu la ĉefartikolon.

esperanto

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910); **establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 105 landoj.

Voĉlegata por blinduloj.

Redaktoro: Mark Fettes.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 48,75; US\$ 23; GM 43; enoj 3600; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn. Anonctarifo (gld.): 1 p. 1540, 1/2 p. 850, 1/4 p. 470, 1/8 p. 260, 1/16 p. 150. Movada rabato 50%. Ekstera-kovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Adreso de la Centra Oficejo de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefona: +3110 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telefakso: +3110 436 17 51.

Telekso: 23721 uea nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (ĝiroficejo Den Haag).

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.

Direktoro de la CO: vakas.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigado, planado): prof. d-ro John C. Wells, 5 Poplar Road, London, Britio SW19 3JR; tel. (081) 542 0302; telefakso (071) 383 4108.

Vicprezidanto (regiona agado, turismo, Fondumo Zamenhof): s-ro Roman Dobrzyński, u. Majdańska 13 m 91, PL-04-088 Warszawa, Pollando; tel. (22) 10 35 05.

Vicprezidanto (eksteraj rilatoj, esperantologio): d-ro Ulrich Lins, Gemarckenstr. 150, D-5000 Köln 80, FR Germanio; tel. (0221) 680 32 50.

Ĝenerala Sekretario: s-ro Osmo Buller, Suksitie 4 B 15, SF-93400 Taivalkoski, Finnlando; tel. (988) 51 003; telefakso (988) 51 681.

Estrarano (informado): s-ro Ivo Durwael, Paul Gilsonlaan 5, B-2650 Edegem, Belgio; tel. (03) 440 30 92.

Estrarano (financo, junularo): s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Estrarano (landaj kaj fakaj asocioj): s-ro Oszkár Princz, Sallai u. 4. II.3, H-1136 Budapest, Hungario; tel. (HEA) (1) 15 60 244.

Estrarano (azia agado, aplikado en scienco): prof. d-ro So Gilsu, Yangchon PO Kesto 11, Seoul - 158-600, Korea Respubliko; tel. kaj telefakso (02) 646 5413.

Estrarano (kulturo): s-ino Spomenka Štimec, Nova Ves 87, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio; tel. (041) 42 92 51; telefakso (041) 42 12 94.

Observanto (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj [ILEI]): s-ro Edward Symoens, Putsesteenweg 131A, B-2180 Kalmthout (Heide), Belgio; tel. (03) 666 62 66.

Observanto (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO]): s-ro Jan Koszmaluk, 32 rue Pajol, F-75018 Paris, Francio; tel. (1) 42 05 88 26.



La Forumo: miksitaj esperemo kaj necerteco

Eŭropa Esperanto-Forumo:

Eĉ pli disigita ol antaŭe?

La hela optimismo pri la integriĝo de Eŭropo, kiu ĝenerale sentebblas en la komunikiloj kaj konversacioj de Nederlando, malfacile travivus semajnon en nordokcidenta Pollando. Estas la lastaj tagoj de septembro 1990. Ĉefaj kaj rusaj aŭtoj limakas sur la grizaj stratoj de Bidgoŝto (Bydgoszcz), urbo al kiu la 20-a jarcento aplikis plurajn inĝeniajn formojn de milita, ekonomia kaj media detruo. Malmulto ŝanĝiĝis depost mia lasta vizito. Ankoraŭ ŝvebas inter diseriĝantaj domoj la acidetaĵoj odoroj de duonbrulinta benzino kaj duon-digestita nigra pano, ankoraŭ la vendejoj – iom pli plenaj ol antaŭe – mallogas la okulon. Kaj la urba operdomo plu staras duonkonstruita apud la rivero. Baldaŭ rekomenciĝos la laboro, oni diris al mi espereme.

Ĉe numero 10, strato Marie Skłodowskiej-Curie, nun staras modesta hotelo de la pola Esperantotur. Ankaŭ tie la ŝanĝoj ne aperas surface: ili okazas profunde, nevideble. En la Eŭropa Esperanto-Forumo troviĝas neniun reprezentanto de okcidenta landa asocio. Litovoj, rusoj, ukrainoj, ĉeĥoj, slovakoj, hungaroj, bulgaroj, rumanoj denove konferencas inter si, kiel okazis dum du jardekoj en la Konsultiĝoj de la Esperanto-Asocioj de la Socialismaj Landoj. Malaperis politikaj baroj, la mensaj baroj restas. Kaj la ekonomiaj.

Pri tiuj ĉi estis malmulte da iluzioj en la Forumo. Árpád Rátkai (Hun-

gario): “La ekonomia diferenco daŭros, ĉar eĉ se progresos la orientaj landoj, samtempe progresos la okcidentaj kaj restos antaŭ ni. Eŭropo dum ankoraŭ longa tempo havos du partojn – eble eĉ tri partojn, ĉar en Sovetunio la ekonomiaj kaj aliaj kondiĉoj sufiĉe diferencas de ‘Meza Eŭropo’.” Kaj lia pola kolego Roman Dobrzyński: “La ‘Pax Jaltinensis’ [Paco de Jalta, alude al la romia ‘Pax Romana’] disfalis en la ‘aŭtuno de la popoloj’. Sed oni povus diri, ke Eŭropo estas nun eĉ pli disigita ol antaŭe. Aperas viza kaj mona ‘fera kurteno’ por anstataŭi la politikan. Kaj la diversaj partoj de Eŭropo iras en kontraŭaj direktoj – en okcidento al unuiĝo kaj fordono de suvereneco, en oriento al renesanceca florado de etaj ŝtatoj.”

Ĉu la landaj asocioj malaperos?

Manke de okcidentaj respondeculoj (kvankam ĉeestis kelkaj unuopuloj el Finnlando, FRG kaj aliloke), la diskutoj neeviteble koncentriĝis al la orienteŭropa evoluo. Tiu ĉi profunde skuis la Esperanto-movadon. Plej detalan bildon de la rezultoj mi aŭdis de Andrzej Pettyn kaj Ryszard Rokicki, respektive prezidanto kaj estrarano de Pola Esperanto-Asocio, kiu antaŭ du jaroj estis la plej granda landa asocio en la mondo. Ĝi rapide ŝrumpas. Multaj anoj ne renovigas sian membrecon, malgraŭ kotizo de nur 6 000 zlotoj – proksimume unu nederlanda

guldeno laŭ la nuna kurzo. PEA havas neniun sperton pri memfinancado, pri la farado de buĝetoj kaj la varbado de mono. La luprezoj saltegis supren, devigante la asocion sublui la pli grandan parton de sia oficejo en Varsovio; ankoraŭ ĝi salajras plurajn oficistojn, sed neniuj scias kiom longe. Rokicki tre kritikas la okazigon de la Forumo, laŭ li nepermesebla elspezo kadre de la nuna krizo.

Sed ne ĉio malfunkcias. Pettyn substrekas, ke PEA jam komencis trovi komercajn partnerojn, kun kiuj ĝi interŝanĝas servojn. Aperis jam vortaroj, kantaroj, lernolibroj k.a. ĉe du eldonejoj, por kiuj PEA plenumas administrajn kaj reklamajn taskojn. En la venonta jaro Pettyn antaŭvidas aperigi eĉ dek du diversajn titolojn laŭ la sama metodo. Kaj Esperantotur sukcesas pluvivi, kvankam duoniĝis ĝia klientaro kaj multe reduktiĝis ĝia profito. Ankoraŭ en 1990 ĝi produktos iom da enspezoj por PEA.

Ne filozofio sed ekonomio

Dum ĝi luktas kun la problemoj de la rimedoj, la asocio frontas samtempe organizan defion: ĝiaj plej fortaj lokaj filioj, kun po pli ol milo da membroj, deziras sendependiĝi. Antaŭ la jarfino, eksterordinara ĝenerala kunveno de PEA devos ŝanĝi la statuton por ebligi la juran registron de la filioj kaj tiel transformi la asocion en iuspecan federacion de regionaj organizaĵoj. Tiu tendenco cetere ne limiĝas al Pollando. Milan Zvara, kiu en oktobro gastigos la unuan Mezeŭropan Esperanto-Konferencon en Poprad, Slovakio, eĉ antaŭvidas ĝian ĝeneraliĝon. “Jam venis propono, ke oni malfondu ĉiujn landajn asociojn en nia regiono, favore al la loka agado kaj iu plurlanda tegmenta organizo. Eĉ se tio ne okazos, kredeble multaj landaj movadoj komencos aspekti kiel federacioj. Tio certe reduktos ilian kapablon por efika agado.”

Dum loka aŭtonomio kondukos al ŝparoj en la centra administrado, ĝi ankaŭ povos malfermi novajn eblojn. Koncepto, pri kiu Pettyn aparte entuziasmas, estas la kreo de memstaraj internaciaj kontaktoj je la kluba nivelo. Sed la kluba sperto samtempe maltrankviligas: en multaj, unu homo sola funkciigas la agadon. Eĉ la varsovia filio jam randas katastrofon pro manko de gvidantoj. Rokicki: “Estas multaj kapablaj homoj, tio certe. Sed mi iom dubas, ĉu PEA povos teni ilin aŭ allogi novajn. Ekaperas multaj ŝancoj en nia socio; homoj kun komercema sento jam trovas aliajn celojn de agado.

Teorie ekzistas ŝancoj por funkciigi PEA sub la kondiĉoj de kapitalismo. Tamen mi timas, ke ni ne sukcesos kapti ilin.”

Tiu timo estas tre disvastiĝinta inter la orienteŭropaj asocioj. Vicprezidanto de Ĉefa Esperanto-Asocio Vlastimil Kočvara: “La integriĝon de Eŭropo motoras ekonomio, ne filozofio. Sed sur la ekonomia tereno ni esperantistoj estas tute ne preparitaj. Mi citu personan ekzemplon: En mia fabriko oni nomis min al komitato pri eksterlandaj kontaktoj, pro tio ke mi scipovas Esperanton. Sed mi tute malsukcesis trovi kunlaborantojn per la vojoj de la movado.” Sekretario de Hungara

*“La unuajn paŝojn
al integriĝo ni
fakte jam vidas.”*

Esperanto-Asocio Oszkár Princz eĥas liajn zorgojn. “En *Budapeŝta informilo* ni havis rubrikon pri ‘Esperanto en la laborejo’ por stimuli tiajn komercajn kontaktojn. Sed post vigla komenco, adresoj simple ĉesis veni. Ankaŭ la anoncoj de entreprenoj malmultiĝis ĉar ili ne portis rezulton.”

Serĉe novspecan kunlaboron

Sed estis ankaŭ pli optimismaj voĉoj en la kunveno. Unu el ili apartenis al sovetiano Andrej Ananjin – barbohava junulo kun dikaj okulvitroj kaj mal-efaza parolmaniero, konata interalie pro sia redaktado de la elstara informbulteno *Eksciu ke...*, kiun li produktas kun eta sed agema Esperanto-kolektivo en Taŝtagol, Siberio. Ankaŭ li konscias pri la limoj de la ebloj en Esperantujo: “Foje mi serĉis seriozajn korespondantojn pri sciencfikcio, kaj ricevis precize unu respondon al mia anonco. Sed okazas ankaŭ bonegaj kontaktoj pere de Esperanto. Preskaŭ ĉiutage mi ekscias pri iu nova ŝanco, kiun ni ofte ne kapablas eluzi, sed kiu antaŭe eĉ ne ekzistis. Kaj la sovetia movado evoluas rapide. Mi scias pri almenaŭ tri novaj revuoj sufiĉe bonkvalitaj, kiuj aperos ekde la venonta jaro. Turismaj oficejoj kaj kooperativoj eksplode kreskas. Aliflanke, ni jam produktas pli da esperantistoj ol ni kapablas kontentigi. Post lerno de Esperanto, la ĉefa stimulo por resti en la movado estas tio, kion oni povas fari per la lingvo, kaj mi konas multajn, kiuj nun dediĉas sian

talenton al iu entrepreno ĉar ili ne trovis sian lokon en la movado. Tial ege gravas, kiajn mediojn ni povas krei por praktiki kaj kultivi la lingvon.”

Princz: “Nia movado ĉiam frontas la elekton inter metodoj desupre kaj desube. En la pasintaj jaroj en orienta Eŭropo la desuprismo portis konsiderindajn rezultojn; sed estonte pli gravos la desubismo, kaj ene de tio atento ne nur al kvanto sed precipe al la kvalito de niaj esperantistoj.” Laŭ Rokicki, ĝuste tio estas unu el la plej gravaj problemoj de la pola movado. “Ni kreis dekojn da miloj da balbutantoj, homoj kiuj lernis kelkajn vortojn nur por povi partopreni en la karavanoj de Esperantotur aŭ alimaniere profiti de la movado. Dum jaroj ni neglektis la kvalitan flankon. Preskaŭ tute mankas al ni tia kerno de altnivelaj kaj dediĉitaj aktivuloj, kiaj vivtenas la okcidentajn asociojn.”

Unu asocio, kiu – laŭ sia propra

la servoj, kiujn ni proponas kontraŭ prezoj por ili malaltaj. Ni devos reklami pli vaste.”

Kaj kio pri la kunlaboro kun UEA? Zvara: “UEA neniam sentigis sin en orienta Eŭropo. Antaŭe tio ne tre gravis, ni pagis niajn kotizojn kaj jen ĉio, sed nun ni urĝe bezonas la helpon kiun ĝi povus doni. Laŭ mi UEA devus transpreni la rolon de forumo por eŭropa integriĝo, aŭ almenaŭ por novspeca kunlaboro inter la asocioj de oriento kaj okcidento. Ni ne atendas donacojn, sed ke ĝi investu ĉe ni, helpu reorganizi la movadon sur komerca bazo, varbu intereson en okcidento kaj donu moralan subtenon.”

UEA-estrarano Princz konsentas. Li substrekas, tamen, ke la integriĝo de la eŭropa Esperanto-movado estos neeviteble malrapida: simple, la diferencoj estas kaj restos tro profundaj, kaj la grandeco de la kontinento superas la nuntempajn kapablojn de la



aserto – ekvidis la danĝeron sufiĉe frue, estas Slovaka Esperanto-Asocio. Zvara fieras pri ĝiaj atingoj, kaj precipe pri la starigo de Internacia Kultura kaj Kleriga Centro en Poprad por prizorgi la komercan flankon. Laŭ li la estonteco de la slovaka movado estas sekura, precipe se ĝi sukcesos varbi kunlaboron de la okcidentaj Esperanto-asocioj. Tio montriĝas surprize malfacila. “Ĝis nun venis al niaj aranĝoj preskaŭ nur orientanoj. La unua kaj ĝis nun sola kunlaboranto el okcidento estis Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino, kiu aranĝis la kibernetikan konferencon ĉe ni kaj nun planas starigian oficejon en Poprad. Eble okcidentanoj ne konscias, kiel bonaj estas

movado. “La unuajn paŝojn al integriĝo ni fakte jam vidas: la regionan kunlaboron en Nordio, en la landoj de Eŭropa Komunumo, en Alpoj-Adrio, la Balkanaj landoj kaj en Meza Eŭropo. Nur kiam vere funkcios tiaj pli limigitaj forumoj, ni povos pensi pri io pli grandskala. Sed komercaj, turismaj, informaj kaj aliaj formoj de kunlaboro estas efektivegeblaj jam nun, sen atendi. Mi esperas ke ĉiuj eŭropaj landaj asocioj donos seriozan atenton al tiuj novaj ŝancoj.”

raportis Mark Fettes

La sekva Eŭropa Esperanto-Forumo okazos en Kaunas, Litovio, aŭtune en 1991.

Amasa intereso por SAT el oriento

Unuafoje post 1934, granda parto – preskaŭ unu triono – de la partoprenantaro en la jarkongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda venis el la landoj de orienta Eŭropo: Sovetunio, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Pollando, Bulgario kaj orienta Germanio. Entute 292 homoj el 21 landoj aliĝis al la 63-a SAT-kongreso, por semajno de diskutoj kaj kulturaj programoj en la aŭstria urbo Linz de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto 1990.

Por SAT, kiu delonge spertis politikajn malhelpojn en la landoj de orienta Eŭropo, la ŝanĝoj de la lasta jaro estis aparte gravaj. Jam venis 400 aliĝoj el la oriento. Laŭ Leo Vulfoviĉ (Moskvo), la nombro de sovetiaj membroj povus denove duobliĝi en la venontaj du jaroj. Sed la ekonomiaj kaj valutaj problemoj estas grandaj, kaj en kelkaj landoj – ekzemple Rumanio – SAT ankoraŭ ne havas peranton. La efikoj ne estas do senescepte klaraj aŭ pozitivaj.

Ankaŭ kelkaj principaj demandoj rolis en la tagordo. La reorganizita Komunista Esperantista Kolektivo proponis kunlaboron kun SAT, kiun la SAT-estraro rifuzis pro memoroj pri la skismo de la tridekaj jaroj kaj la sekvaj jardekoj de reciproka kalumniado. Tamen kelkaj ĉeestantaj KEK-anoj relevis la demandon, kiu estigis ardan diskuton. De aliaj partoprenantoj venis proponoj por la revizio de la SAT-ideologio, kaj precipe por la forigo de terminoj kiel kamarado kaj klasbatalo. La rolo de la Laboristaj Esperanto-Asocioj estis diskutata; ŝajne multaj preferus sistemon de landaj sekcioj, kaj iu eĉ proponis ke Bulgara Esperanto-Asocio povus esti membro samtempe de UEA kaj de SAT. Tamen neniuj ŝanĝoj estis deciditaj en la kongreso mem.

En la kongresa deklaro, la partoprenantoj esprimis sian subtenon al la “disfalo de diktaturoj” kaj “emancipiĝo de la respublikoj en Sovetunio kaj aliaj orienteŭropaj landoj.” Ili aldone atentigis “pri ĉiuj poluadoj kiuj grave endanĝerigas la vivon sur nia tuta planedo.”

La sekva kongreso de SAT okazos en Bruselo, Belgio, kaj por 1992 ĝi estas invitita al Kaunas, Litovio.

informoj el *Sennaciulo*



Kafkruĉo estis nur unu el la ĉarmaj rolantoj en “La revo de la pupfaristino” de Petruŝka.

Norvega “Petruŝka” gajnas korojn

La 23-a Pupteatra Internacia Festivalo en Zagrebo, Jugoslavio, de 31 aŭgusto ĝis 5 septembro, pasis pli modeste ol ĝis nun. Unue, ĝi daŭris unu tagon pli mallonge; due, ĝin partoprenis ne 22 teatroj, kiel ĝis nun, sed 15; trie, estis reprezentataj 9 anstataŭ 13 landoj. Oni ne devas longe serĉi la kaŭzon, certe la monmanko influas ankaŭ al PIF.

Nur kvar teatroj prezentis en Esperanto: Vraca kaj Vidin el Bulgario, “Petruŝka” el Norvegio kaj “Tandarica” el Rumanio. Tiel estonte pli kaj pli PIF povus perdi sian esperantistan karakteron, kvankam ĝin organizas Internacia Kultura Servo – profesia Esperanto-entrepreno, kiu havas sian lokon en la avangardo de nia movado. Bezonataj estas ne nur la klopodoj de la organizantoj, sed ankaŭ la helpo de la naciaj Esperanto-organizaĵoj kaj la lokaj esperantistaj grupoj, kiuj ja povus ankaŭ profiti de altnivela kultura agado en la internacia lingvo.

Ĉiuj Esperantaj prezentaĵoj estis lingve kontentigaj kaj ĝenerale bonaj kaj viglaj spektakloj. Elstaris tamen du el ili – ne nur Esperante sed ankaŭ

arte. “La hundeto kiu ne povis boji” de la Ŝtata Pupteatro Vraca estis plenumita de gaja, kantanta teamo kiu en flua lingvaĵo parolis kaj kantis, kaj per vere alloga spektaklo kun interesaj pupsolvoj el muziknotaj teniloj entuziasmigis la publikon. Norvega pupistino Tatjana Zaitzowa konkeris ĉies koron – kaj tiun de infano kaj tiun de severa plenkreskulo – per sia sendube pinta animiga arto kaj bonega scenaro de la prezentaĵo “La revo de la pupfaristino”. Ne eraris la infana ĵurio kiu atribuis sian ĉefpremion al ŝi. La vraca trupo siavice ricevis la Grandan Lingvan Premion pro sia admirinda uzo de Esperanto, kaj ĝia aktoro Emil Penjaŝki ricevis la nuran individuan premion “Jozefo Petrin”, kiun s-ino Gigi Harabaĝiu afable disponigas al PIF jam dudek jarojn. La prezento el Vidin estis korekta, profesia, sed sen io kio surprizus nin, kaj tiu de “Tandarica” estis lerta marionetspektaklo kiu ricevis specialan premion pro sia bonege aranĝita surbendigo.


Ankaŭ en la ĝeneralaj PIF-premioj partoprenis la E-teatroj. La ĉefpremion

Milan Ĉeĉuk gajnis la neesperanta trupo el Zadar, Jugoslavio, pri "Fiŝisto Palunko kaj lia edzino", sed la premion Tibor Sekelj por la "plej homama mesaĝo" ricevis la kolektivo el Vraca, kaj specialan diplomon pro ĝenerala impresado kaj teatre trafa virina vidpunkto de la mondo ricevis "Petruška". Aliaj specialaj premioj iris al pupteatro "Kheimh Shab Bazi" el Irano pro flegado de la propra puptradicio, kaj al pupteatro el Wrocław pro la sukcesa transigo de "Faust" en la pupteatran medion.

Ĉi-jare post periodo de regreso ni feliĉe spertis denove ioman kreskon kaj vigliĝon rilate la esperantistan publikon. Venis infangrupo el Varpa-lota en Hungario kaj dudeko da esperantistoj el Hungario, Bulgario, Hispanio, Aŭstrio, Svedio, Koreio kaj Jugoslavio. En la venonta jaro verŝajne okazos kelkaj prezentaĵoj de PIF ankaŭ en Graz, Aŭstrio – plia kaŭzo, ke vi planu vian viziton al la 24-a PIF kaj ties ĝuindaj spektakloj por infanoj kaj plenkreskuloj.

Zlatko Tišljari (organizanto)
kaj Ljubomir Trifonĉovski
(UEA-komisiito pri teatro)

Foto: Slobodna Dalmacija



La jugoslavia teamestro Dane Korica (dekstre) favoras pli vastan uzon de Esperanto en la sporta mondo, laŭ intervjuo de esperantisto-ĵurnalisto Davor Grgar.

Por kultura kunlaboro inter 18 provincoj

Pli ol cent partoprenantoj kolektiĝis en la ĉarma okcidenthungara urbo Kőszeg, la unuan semajnfino de septembro, por la dua novstila Alp-Adria Esperanto-Konferenco. Tiu posteulo de la tradiciaj Trilandaj Konferencoj inter Aŭstrio, Jugoslavio kaj Italio celas kunlaborigi esperantistojn en la kontaktoj inter la 18 provincoj, kiuj konsistigas Labor-komunaĵon Alpoj-Adrio. Krom provincoj el la tri menciitaj landoj, en la Laborkomunaĵo troviĝas ankaŭ provincoj el Hungario kaj Germanio. Temas do pri regiono kun kvin ŝtataj kaj pluraj minoritataj lingvoj el ĉiuj kvar grandaj lingvofamilioj de Eŭropo. Ĝia ĉefa celo estas la venkado de problemoj kiuj transiras limojn, ekzemple trafikaj kaj ekologiaj, sed ekzistas ankaŭ komisiono pri kultura kunlaboro.

La lingvan problemon oni en Alpoj-Adrio ne multe konsideris, verŝajne ĉar ĝi estas kaj ampleksa kaj kompleksa. Tamen la esperantistoj de la regiono decidis atentigi pri la neceso studi kaj laŭeble solvi ĝin. En Kőszeg oni do ne nur praktikis perfekte funkciantan internacilingvan kun-

vivadon, sed ankaŭ priparolis la necesajn organizajn paŝojn por pli integri la Esperanto-movadon en la kultura agado sine de la Labor-komunaĵo. Tiurilate la slovena delegacio portis gravan informon: la kultura komisiono akceptis la proponon de kultura partopreno de la Alpadria esperantistaro. Tio definitive signifas, kaj necesas tion multfoje diri al la ĝenerala Esperanto-komunumo, ke esperantista kulturlaboro establiĝis en granda internacia, interregiona organizaĵo.

Lingvistika konferenco en 1992

Ankoraŭ ne ĉiuj 18 provincoj en Alpoj-Adrio disponas pri ekzistanta Esperanto-organizaĵo, kaj ne ĉiu ekzistanta organizaĵo nepre kapablas trovi homojn, kiuj ne nur reprezentas la movadon sed efike laboras sur la kampo de kultura interŝanĝo. Tiuj demandoj restas solvendaj per estontaj konferencoj. Dume oni antaŭvidas kelkajn konkretajn aktivaĵojn: la disponigon de la partoprenantaj teatroj en la zagreba Pupteatra Internacia Festivalo al Graz (Aŭstrio) kaj Triesto (Italio), festivalon de amatoraj

E-artistoj kadre de la konferencoj, librokonkurso por E-literaturaĵoj eldonitaj en la regiono, kaj dujaran lingvistikan konferencon pri la lingva situacio en Alpoj-Adrio. La provizora kunordiga komitato planas okazigi la unuan tian en Graz en 1992, en oficiala kunlaboro kun la aŭtoritatoj Alpadriaj (do ne nur en Esperanto), kio signifas novstilan eliron el niaj bone protektataj rondoj. Jam certiĝis kunlaboro flanke de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno kaj lingvistika profesoro Heiner Eichner de la viena universitato.

Fine de la konferenco en Kőszeg la partoprenantaro unuanime akceptis deklaron, kiel identigilon de la Esperanto-komunumo en Alpoj-Adrio. La deklaro mencias la eksterordinarajn ŝanĝojn en Eŭropo, la sekvan neceson de intensigita komunikado, la problemon de lingva diskriminacio, la longan historion de esperantista kunlaboro en la regiono, kaj konklude proponas rolon por Esperanto kiel internacia komunikilo kiu ebligas praktikan egalrajtecon en la komunikado. Krome – kaj sufiĉe nekutime – ĝi proponas, ke oni pli-intensigu la lernadon de najbaraj lingvoj en Alpoj-Adrio, pro ne nur ekonomiaj sed ankaŭ kulturaj kialoj, kaj mencias la propedeŭtikan rolon de Esperanto en la lingvolernado.

H. M. Maitzen kaj Z. Tišljari

Sporta raporto

En la 15-a Eŭropa Ĉampioneco de Atletiko, de la 27-a de aŭgusto ĝis la 1-a de septembro en Split, Jugoslavio, la partoprenantoj sukcesis renversi 40 eŭropajn kaj 47 mondajn rekordojn. Nur du lingvoj estis oficialaj en la plej grava eŭropa sportaranĝo de 1990: la serbokroata kaj la angla. Tamen ankaŭ Esperanto havis sian lokon en la informado.

Almenaŭ ses esperantistoj laboris por la organizado de la ĉampioneco. En ties komunikcentro deĵoris Davor Grgat – profesia ĵurnalisto el Split kaj multjara E-aktivulo. Jam inter la unuajn oficialajn komunikojn pri la evento s-ro Grgat metis bonvenigan tekston en Esperanto, kaj la antaŭlastan tagon li atentigis siajn kolegojn-ĵurnalistojn pri ĝia rolo, en Esperanto, la serbokroata kaj la angla. Krome li intervjuis la jugoslavian teamestron Dane Korica, interalie pri la lingvaj problemoj de sportistoj en tiaj aranĝoj. S-ro Korica poste ripetis sian opinion en internacia gazetara konferenco pri sia teamo:

“Pro la fakto ke Esperanto estas neŭtrala, ĝin lernas kaj parolas ne nur blankuloj, sed same homoj sur ĉiuj kontinentoj. Estas do klare, ke ĝi estas lernebla kaj parolata. Kaj tiun tempon, kiun alie ni uzus por la lernado de aliaj fremdaj lingvoj, ni povus uzi por akiri pli bonajn sportajn rezultojn. La utileco de Esperanto estas netaksebla, kaj mi esperas ke almenaŭ pli junaj homoj tion akceptos...”

La intervjuo kun s-ro Korica estis elsendita de Radio Split, kaj la Esperantan tekston oni povas peti de Davor Grgat, Pajličeva 21/1 Gripe-Lokve, YU-58108 Split, Jugoslavio.

Rusa AIS-sesio definitive okazos

En la marta numero de ESPERANTO ni unuafoje informis pri la planoj aranĝi Esperantan akademian kunvenon en Moskvo kaj Leningrado, okaze de la Jaro de la Rusa Kulturo 1991. Temus fakte pri unu el la sesioj de Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino, pri kies esperiga disvolviĝo ni raportis en la lasta numero.

Sekve de la septembraj AIS-sesioj en Sanmarino kaj Bjalistoko, la okazigo kaj datoj de la rusa sesio fariĝis definitivaj. Forfalis la leningrada duono: la scienca programo nun okazos **en Moskvo de la 2-a ĝis la 7-a de januaro 1992**. Antaŭe oni aranĝos festivalon de la rusa arto (parte en Esperanto), ekde la 29-a de decembro 1991, kaj poste estos ebleco partopreni tritagan ekskurson al Leningrado (8-10 januaro).

La temo de la aranĝo estos “**Lingvo – kulturo – ekologio**”, kaj la ĉefa celo: studi la rusan kulturon sur la fono de kelkaj plej gravaj mondaj problemoj, i.a. tiuj de la komunikado kaj de la konservo de la kvalito kaj vario de la vivmedio – ne nur el natura sed ankaŭ el socia kaj kultura vidpunktoj. Krom konferencoj kaj rondtablaj diskutoj, ankaŭ lekcioj kaj kursoj pri plej diversaj fakoj formos parton de la programo. La laborlingvoj estos Esperanto kaj la rusa, kun samtempa tradukado.

La aranĝon jam aŭspicias tre respektataj organizaĵoj kaj individuoj en Sovetunio. I.a. kinoinstitutulo “Mentor Cinema” provizis subvencion, kiu ebligis

la dungon de plentempa kunordiganto, kaj la sovetia Unesko-komisiono proponos la sesion por subvencio de Unesko. Dudeko da sciencistoj kaj esperantistoj jam aktive laboras ĉe la organiza flanko. Tamen ĝis nun venis multaj **konkretoj proponoj de program-kontribuoj el eksterlando**. Interesatoj bonvolu sendi 1- aŭ 2-paĝan resumon de siaj ideoj, tajpitan kun 1,5-liniaj interspacoj en kadro 25 x 17 cm, antaŭ la fino de januaro 1991 al: Rusa AIS-sesio, MGOSNIO SSSR, Sadovaja Kudrinskaja 18, SU-103001 Moskvo (tel. 291-30-18, faks. 7095-200-32-62). Al la titolo de la

resumo aldonu la nomon, sciencajn gradojn kaj landon; piednote indiku la adreson.

La sesia kotizo ĝis la 1-a de marto 1991 estas 80 DM, poste ĝis la 1-a de aŭgusto 100 DM, de 1 aŭgusto ĝis 1 decembro – 130 DM, kaj poste 160

DM. Loĝado, nutrado, ekskursoj kostos proksimume 420 DM ĝis 1 marto, 500 DM ĝis 1 aŭgusto, 600 DM ĝis 1 decembro kaj 700 DM poste. Partoprenantoj el netranspagipovaj landoj ricevas 50%-an rabaton; eblas ankaŭ partopreno surbaze de reciproka gastigado kaj nur 5% de la kostoj en la koncerna periodo, sed necesas negoci tion sufiĉe frue. La monon el eksterlando sendu al poŝtĝirkonto 2051-305 ĉe ĝiroficejo Hannover, BLZ 25010030, laŭ nomo “EKE, organizejo RAISS”. Aliĝojn kaj ĉiuspecajn demandojn direktu al Centro “Esperanto-Kulturo-Ekologio”, ĉe “Mentor Cinema”, a.k. 915, SU-103009 Moskvo (tel. 187-02-22, 244-85-63 kaj 244-80-24).

Lev Medvedev
(direktoro de la Centro EKE)



Scienca apliko:

Komerca tradukprogramo haveblas

La nova komputilprograma entrepreno Tramond KB en Bengtsfors, Svedio, en julio ĉi-jare surmerkatis sian unuan komputilan tradukprogramon, Trans S-E. Ĝi estas duonaŭtomata kaj tradukas el la sveda en Esperanton. Manlibreto difinas la limojn de ĝia kapablo. Kiam la uzanto enigis sian svedan tekston, la programo ĉe plur-sencaĵoj demandas sur la ekrano, kiun alternativon ĝi elektu.

Post fintraduko oni povas eltajpi la tekston aŭ registri ĝin sur la malmolan diskon por posta uzado.

La perkomputila tradukaĵo ne bezonas ĝustigon. La programo do konvenas por tiaj uzantoj kiuj bone regas la svedan lingvon sed tute ne scipovas Esperanton kaj tamen volas utiligi tiun lingvon. Kompreneble ĝi povas esti uzata ankaŭ por lingva ekzercado.

Trans S-E estas la unua programo en planita serio. La dua programo en la serio, Trans E-S, estas aĉetebla ekde la fino de oktobro. Ĝi tradukas el Esperanto en la svedan lingvon. Dum la venonta jaro (1991) pretiĝos kvar programoj, nome du programoj por la germana lingvo kaj du programoj por la hispana lingvo. Poste oni povos uzi la programojn ankaŭ duope, tiel ke oni ricevos tradukon ekz. en la germanan rekte el la sveda.

Per Tore Edler (Svedio)

Instruado al verduloj – laŭ la spuroj de Andreo Cseh?

Marianne Lund, multjara aktivulo de Norvega Junularo Esperantista (NJE) kaj lastatempe estrarano de la E-klubo en Tromsø, ĉi-somere partoprenis kun geamikoj ekologiajn bicikladon kaj tendaron en Meza Eŭropo, dum kio ili povis instrui Esperanton al la aliaj partoprenantoj. Jen ŝia raporto, ĉerpita el la paĝoj de NORVEGA ESPERANTISTO.

Ĝis nun ni ĉiujare pasigis la somerajn feriojn biciklante por Esperanto en grupo de aliaj esperantistoj. Sed ĉi-somere ni kvarope decidis fari la samon en aranĝo neesperantista.

Ni elektis partopreni bicikladon por ekologio kaj mediprotektado. Ĝi komenciĝis en Bergeno tuj post la medikonferenco en majo, sed ni aliĝis nur en suda Germanio kaj kunbiciklis unu monaton ĝis la fina celejo: granda trisemajna festivalo en Hungario, nomata Ekotopio.

Ĝi estis samgranda kaj same internacia kiel tipa TEJO-kongreso (500-1000 partoprenantoj). La ĉefa diferenco estis, ke oni (ankoraŭ!) ne parolis Esperanton.

Kursoj subĉiele kaj spontanee

Ni kvar, kiuj decidis parte kunbicikli la lastan monaton kaj ĉeesti la unuajn tagojn de Ekotopio, venas el tri landoj: Francio, Danio kaj Norvegio. Hazarde partoprenis en la biciklado ankaŭ latvo, kiu lernis Esperanton antaŭ dek jaroj kaj ankoraŭ multon memoris, do fine ni estis kvin. Tio estas tre grava kondiĉo por krei intereson pri Esperanto en ne-Esperantaj grupoj: se oni estas la sola Esperanto-parolanto, oni malfacile povas montri la lingvon en praktika uzo, kaj se oni partoprenas kiel grupo de samlingvanoj, parolante Esperanton oni riskas impresi iomete fanatikaj.

Ni devas konfesi, ke neniu el ni preparis ion ajn antaŭ la biciklado por fari kursojn pri Esperanto. Ni tutsimple anoncis lokon kaj horon por la venonta Esperanto-kurso dum la vesperaj plenkunsidoj de la biciklantaro. La kursoj okazis preskaŭ ĉiam subĉiele kaj ofte spontanee, dum manĝopaŭzoj, atendante burokrataĵojn ĉe limpasejoj kaj simile. Ĉiufoje venis grupo da lernemuloj, el kiuj kelkaj jam lernis iomete iun antaŭan tagon, kelkaj jam dufoje

antaŭe, kaj kelkaj neniam. Ni do dividis ilin kaj faris du aŭ tri aŭ ĉ kvar grupojn laŭ ilia nivelo. Ĉiu grupo havis unu, du aŭ tri instruantojn. Se kelkaj aparte rapide lernis, aŭ se estis tro multaj lernantoj en unu nivelo, ni denove dividis ilin.

Metodo konversacia

Ni kutime sidis sur la herbo en granda cirklo, sen tabulo kaj ofte ĉ sen papero kaj skribilo. Ni sekvis neniun precizan metodon, sed nur improvizis frazmodelojn kaj vortojn kiujn ni lernigis al ili per la metodo konversacia: aŭ la instruanto demandis al ĉiu, unu post la alia, aŭ la lernantoj demandis al la apudulo en la cirklo, kiu respondis kaj poste pludemandis. Kelkfoje la lernantoj en unu grupo ne havis komunan lingvon, tiam ni devis provi klarigi ekz. gramatikon nur per Esperanto; tion eblis fari pli facile se du instruantoj povis demonstri per demandoj kaj respondoj ĝustaj kaj malĝustaj.

Sed kvankam dum la instruado ni ĝenerale ne uzis lernomaterialon, ni tamen havis kelkajn paperojn por disdoni: de la oficejo en Oslo ni ricevis kvinlingvajn flugfoliojn “Kial Esperanto estas la lingvo por la verduloj?”, kaj delegito en Linz donacis al ni lernolibron, stokon da grandaj faldfolioj pri la strukturo de Esperanto (sam-enhavaj kiel la “ŝlosiloj”) kaj aliajn pri la ideo kaj uzo de la lingvo (ĉio germanlingve). Ni ankaŭ faris unu propran A4-formatan folion pri la gramatiko.

Kreskanta intereso

La intereso pri Esperanto estis granda inter la biciklantoj, eble ĉar la lingvaj problemoj en la grupo estis pli gravaj ol multaj imagis antaŭe. (Dum la vesperaj plenkunsidoj, kun ĝis 140 homoj, oni devis ĉiam traduki ĉion en la germanan, la anglan kaj la ĉeĥan. Malgraŭ tio estis ankaŭ francoj, rusoj kaj eble kelkaj aliaj kiuj tamen ne komprenis. Unu ruso ĉ foriris el la karavano pro tio ke li enuis ĉar li nenion povis kompreni.)

Kaj en Ekotopio la intereso ĉ kreskis, eble ankaŭ tie sekve de iom akraj diskutoj pri tradukado dum la plenkunsido. Al nia unua kurso pri Esperanto venis 60 lernontoj, kaj dum

la du-tri tagoj kiam ni restis tie, ni faris plurajn lecionojn tage. Kaj la tendoj ĉ ricevis Esperantajn nomojn – ideo ne nia!

En la fino de nia instruado ĉeestis ankaŭ hindo, kiu fervore parolis dum pli ol dudek minutoj pri Esperanto, kaj tiu interveno de ekstereŭropano favore al nia ideo bone impresis la ĉeestantojn.

En tiu festivalo ni hazarde renkontis tri aliajn Esperanto-parolantojn – nederlandanon, rusinon kaj svedinon – kaj espereble ili daŭrigis la kursojn post ni. Poste ni vizitis Esperantan junularan renkontiĝon aliloke en Hungario, por varbi transprenontojn de la instruado post nia foriro.

Partopreni plurope

La konkludo de tiu ĉi eksperimento estas, ke ni povas fari multe pli por Esperanto se ni miksiĝas en ne-Esperantaj aferojn plurope, ol se ni nur kultivas nian lingvon ene de Esperantaj medioj. Venontfoje (eble dum Ekotopio '91 en Estonio) oni devus veni multe pli preparite por instruado. Sed ankaŭ estas grave, ke nur partoprenante kaj parolante Esperanton kun kelkaj aliaj estas bonega prezento de nia lingvo.

Marianne Lund (Norvegio)

Surherba instruado: tiu “junulara metodo” ofte aplikigas dum la TEJO-kongresoj, ekzemple ĉi tie en Krakovo (1987).



Survoje al azia junulara kongreso?

El la septembra numero de NOVAJOJ TAMTAMAS, eldonita de Jokohama Esperanto-Rondo, ni plukis jenan raporton pri unu el la plej notindaj junularaj aranĝoj en la monda movado.

La 9-a Komuna Esperanto-Seminario inter Japana kaj Korea Junularoj, mallonge KS-9, okazis de la 10-a ĝis la 12-a de aŭgusto, 1990, en Junulara Trejnejo Tobong-san, ĉe la monto-piedo de Tobongsan en la norda periferio de Seulo, la ĉefurbo de la Korea Respubliko. Ĝin partoprenis (ĉu korpe ĉu spirite) 162 junaj gesamideanoj: 126 koreoj, 27 japanoj, 4 tajvananoj, 2 usonanoj (el ili 1 loĝanta en Tajvano), 1 finno (loĝanta en Tajvano), 1 franco, kaj 1 koreo el Pekino.

Aere varma, etose varma

Jam en la tagoj antaŭ la seminario, japanaj partoprenontoj iom post iom kolektiĝis en Seulo, urbo same varma kiel Tokio. Ili estis bonvenigataj i.a. en la Aerhaveno Kimpo, kaj poste oni povis babili en la oficejo de Korea Esperanto-Asocio, en la centro de la urbo.

En la 9-a de aŭgusto posttagmeze, oni venis per buso aŭ trajno al Tobong,

kiu estas turisma centro por mont-amantoj, kiuj grimpas la Monton Tobongsan. Oni luis la tuton de la junulara trejnejo, nome 9 loĝoĉambrojn, halon, manĝejon ktp. La halo, manĝejo kaj duŝejo, kiuj troviĝis en la duone subtera etaĝo, estis relative nevarmaj, kaj estis agrable pasigi tempon tie. Sed la 9 loĝoĉambroj en la unua etaĝo fariĝis tre varmaj tage. Save estis en la vespera kaj frumatena malvarmeteco.

Mankis nigra tabulo en la ĉambroj, kio estis iom ĝena por kelkaj seminarioj grupoj. Ĉiuj sursidvange sidis sur planko plasta: viroj krucgenue kaj virinoj flankenigantaj genuojn, kio estas moro komuna al koreoj kaj japanoj.

Bonvenus pli variaj kunsidoj

En 5 tempokadroj, sume 10 horoj estis dediĉitaj al kunsidoj, kiujn oni povis libere elekti. Multaj okazis loĝoĉambre.

- Universitato (15 studentoj): Koreaj kaj japanaj studentoj same suferas de la malfacileco varbi novajn anojn kaj prosperigi klubon.
- Azia Junulara Kongreso, aŭ ĝenerale pri la azia movado.
- Radio-amatoro: kontaktas japa-

najn kaj aliajn samideanojn radie, per la vokosigno HLIKMJ.

- La seminaria temo, "Kion ni faros por la azia movado".

- Korea Eksprese (10): S-ro BAK Giŭan, aŭtoro de la samnoma Esperante verkita lernolibro de la korea lingvo, gvidis japanojn. Unue okazis teoria prezento de fonologio, literoj ktp, kaj sekvis ekzerco de sin-prezentado.

- Vojaĝo (15): Kiel vojaĝi alilanden per Esperanto, kaj kiel s-ro HO Song kaj aliaj vojaĝis, per fotoj.

- Espera Monto (7): La membroj iris montogrimpi. S-ro MUROTA Kej promesis pluan kontakton de japanaj mont-amantoj kun la koreaj.

- Matematiko (14): Pri matematiko, lingvo, logiko kaj homaj sentoj prelegis ŜIBAJAMA Jun'ichi.

- La Esperanto-movado en Tajvano (16): S-ro Bradio V. MORO III, usonano loĝanta en Tajvano, iniciatis, kaj oni eĉ priparolis la eblecon organizi renkontiĝon Esperantan en Tajvano post 1 aŭ 2 jaroj.

- Kunverda Kurso por Komencantoj (KKK; 30, fine 11): elementa konversacia kurso por koreoj. Cetere, en la kunloĝado estis multaj komencantoj.

- Facila Kartoludo: Oni ludis gramatike motivitan kartoludon. Ĝin iniciatis s-o FUKUI Masaharu.

- Naĝado: Posttagmeze de la meza tago, iuj naĝis en proksima naĝejo.

Nuliĝis la antaŭplanitaj kunsidoj de kantado kaj de kristanoj.

Laŭ mia opinio, pli variaj fak-kunsidoj, se en nur unu tempokadro, estus bonvenaj en tiaj okazoj.

Fajra gimnastiko

Ĉiun vesperon post la 9-a ĝis senfine oni dediĉis al amuziĝo.

En la 9-a tago estis Interkona Vespero. Oni grupiĝis laŭ loĝoĉambro en la halo, kaj rigardis i.a. Aŭa-dancon de japano, ĉinan kanton de tajvanino, dancon de franco kaj koreanino, aŭ ludon de la reprezentantoj de loĝoĉambroj. Poste la halo fariĝis disko-teko, kun diverskoloraj lumoj kaj fulmo-lumoj. Ĉar ne estis najbaraj domoj, oni povis senĝene brui ĝis post noktomezo.

La 10-an tagon okazis Kampfajre Gaja Vespero. La fajron bruligis simbolaj reprezentantoj de la kvin landoj. Oni aŭskultis muzikon de korea studenta grupo, de japano ktp, kaj la vesperon kulminis koreaj tradiciaj tamburdancoj. La dancojn prezentis "Espera Mondo", kelke da koreaj junuloj-samideanoj, kiuj prezentis la dancon ankaŭ en Japanio. Ili revenis

Foto: A. Sochacki



ĝustatempe por prezenti la dancon antaŭ KS-anoj. Ili gvidis ĉiujn ĉirkaŭ-fajrajn sidantojn stari kaj danc-kuri ĉirkaŭ la fajro; tio estis ja bona gimnastiko al mi jam ne plene juna. Iuj poste diskotekis, aliaj sub nigra ĉielo babiladis, aŭ gitaris.

Cetere, posttagmeze de la 11-a tago, oni havis ŝancon sporti.

Kien la KS-10?

La titolo ĉi-supra havas duoblan sencon: ĉu ŝanĝi la karakteron de la Komuna Seminario? kaj kiu efektive preparos la 10-an, en Japanio? La provizoraj konkludoj estas: KS-10 okazu, senŝanĝe de la karaktero, en somero 1991, en urbo Kameoka (proksime de Kioto), laŭ la aranĝo de Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto (EPA).

Kiel unua demando pri la karaktero de la KS estis levita, unuflanke, ĉu vastigi la aferon ne nur kore-japane, sed inkluzivi aliajn orient-aziajn partojn, kaj aliflanke, ĉu la okazaĵo pli indas esti nomata Kongreso aŭ Renkontiĝo, ĉar lastatempe seriozeco de laŭvorta "seminario" emas manki.

Sed oni konkludis, en diskutoj pri la azia movado kaj aliaj, ke ankoraŭ ne maturiĝis la organiza kapablo de aliaj orient-aziaj landoj, kaj oni gastigu tieajn membrojn sed KS tenu la nunan epiteton korea-japana. Cetere, ne estas malinde, ke seminario havu liberan tempon por amikiĝi. Tial almenaŭ la jubilea 10-a KS okazu en la nuna stilo kaj kun la nuna titolo.

Kelkaj lastaj impresoj

Resume, la seminario estis tre granda okazaĵo por koreaj junuloj, kaj ankaŭ komencantoj kuraĝe partoprenis ĝin. Japanflanke, eble pro tio ke aliaj Esperantaj aranĝoj multas en Japanio, iom mankas dediĉiteco al la afero.

Mi tamen estas certa, ke amikiĝoj (kaj amiĝoj, ĉu?) estis multaj por ambaŭlandaj kaj ankaŭ alilandaj samideanoj.

Mi aldonu ĝeneralan impreson: la ekonomia substrukturo estas tre rapide progresanta en Koreio. Ekzemple, telefakso estas instalita en la oficejo de KEA, kaj preskaŭ ĉiuj koreaj partoprenantoj (kiel la japanaj) krom sia adreso informis telefonnumeron. Tiuflanke, la tiel nomata "tiom-da-jaroj-da-malfruo" post la japana ekonomio estas jam preskaŭ likvidita.

Kaj en la paroloj de koreaj amikoj, mi sentis ardan deziron reunuigi la landon, ĉar eĉ Germanio estas nun reunuiganta.

ŜIBAJAMA Ĵun'icĥi (Japanio)

TEJO-seminario:

"Marĝenoj" el ĉiuj flankoj

Certe la organizantoj ne povintus elekti pli taŭgan ejon por diskuti pri la temo "Homoj marĝene de la socio", en TEJO-seminario de la 14-a ĝis la 19-a de septembro. Jettenbach, malgranda vilaĝo perdita en la germana kamparo ĉ. 50 km oriente de Munkeno, verŝajne ludis gravan rolon en la inspiro de la dumseminariaj diskutrondoj. . . .

La temo estis tre vasta, kaj la prelegantoj ĝin analizis el plej diversaj vidpunktoj, sekvante tamen strukturon, kiun la organiza teamo klopodis doni al la seminaĵaj laboroj. Ĉiun prelegon sekvis longa (se eble) debato, dum kiu ĉiuj havis ion por demandi, kontraŭaserti aŭ aldoni, surbaze de siaj propraj studoj aŭ spertoj. Ju pli la

praktikajn konsilojn por la malfacila periodo inter studado kaj eniro en la labormerkaton.

Pri etna marĝenigo prelegis Amri Wandel. Li prezentis la tre specifan kazon de Israelo, nome la malfacilan kunekziston de enmigrintoj, enlandaj minoritatoj kaj novaj enmigrantoj, precipe el Sovetunio. Ankaŭ Minna Ollikainen uzis tre specifajn ekzemplojn de marĝenigo pro "korpaj kialoj": kazojn de alkoholismo en Finnlando. Lia prelego estis unu el tiuj, kiuj uzis rol-ludojn por vivi la problemon, ĉar oni aktore legis la historiojn de efektive ekzistantaj personoj marĝenigitaj aŭ marĝenigintaj pro sia dependo de alkoholo. Aktoran teknikon uzis ankaŭ Anna Ritamäki, kiu ĵus reprezentis TEJO-n en trejnkurso ĉe la Eŭropa Junulara Centro. Ŝia rolludo bildigis la iom-post-ioman interkonatiĝon de du malsamkulturaj grupoj.

Specife Esperantan kazon de marĝenigo diskutis vespera rondo gvidata de Bianka Jacobsen. Temis pri la spertoj rakontitaj en la libro *Fajron sentas mi interne* de Ulrich Matthias, pri homo kiu, ne estante kapabla sin ĵeti en la socian vivon, trovas sin marĝenigita ene de tiu Esperanto-movado, kiu asertas kaj kredas sin plej malfermita kaj akceptema.

Pli ĝeneralajn aspektojn de la temo prezentis Francesco Pignatelli, elstarigante kelkajn hipotezojn pri la psikologiaj kaŭzoj de marĝenigo, kaj Bernard Westerhoff, kiu traktis prefere la sociajn-pedagogiajn procezojn rolantajn en interkomunumaj rilatoj kaj eblajn solvojn al la koncernaj problemoj. Annegret Mayer prezentis la bahaan modelon por tia solvo.

La seminario denove donis interesan ŝancon al kelkaj gejunuloj (bedaŭrinde malpli ol la organizantoj antaŭvidis) por renkontiĝi kaj serioze diskuti pri nekutima temo. Ne mankis eblecoj kaj taŭga etoso por amuĝi (inkluzive de tutaga ekskurso al la fama kastelo apud la lago Chiemsee), sed amuĝo en si mem ne estis la celo de la renkontiĝo. Kaj tio ne nepre estas negativa flanko, ĉefe en movado, kiu, eĉ nur por pluvivi, bezonas aktivajn kaj kapablajn gejunulojn pli ol turistojn.

Anna Cimossa kaj
Alessandro Amerio (Italio)



Marĝenoj eĉ en Esperantujo . . .

interparolado profundigis, des pli ni malkovris novajn facetojn por diskuti, tiel ke la seminaĵa temo iel restis ĉiam viva kaj debatata, foje eĉ ekster la labortempo.

La ekonomiajn aspektojn de marĝeneco oni alfrontis per prelegoj de Barbara Despiney kaj Elisabeth Schwarzer: la unua, ekonomikisto, pritraktis la drastan plialtiĝon de senlaboreco en la orienteŭropaj landoj lige kun la transiro al merkata ekonomio; la dua turnis sin al la junulara senlaboreco en okcidento kaj donis

Honoraj Membroj de UEA:

Pioniroj el tri kontinentoj

En la 75-a Universala Kongreso en Havano, la Komitato de UEA elektis kvin novajn Honorajn Membrojn de la Asocio. Laŭ la kutimo, ni prezentas ĉi tie la inspirajn vivrakontojn de tiuj dediĉitaj laborantoj por Esperanto.

ITÔ Kanzi (Ludovikito) naskiĝis la 15-an de januaro 1918 kaj esperantistiĝis iam en 1959. En la "biografio", kiun li proponis al ni por publikigo, troviĝas nur unu plia fakto: "komencis eldonadi la pvz-on en 1973". Tiu pli ol modesta komuniko kaŝas en si, por inicitoj almenaŭ, plenan pravigon de lia honorigo, ĉar sufiĉas deĉifri la mallongigon PVZ: Plena Verkaro de Zamenhof, al kiu Ludovikito mem aldonadis la optimismajn vortojn "Iam kompletigota...". La revo preskaŭ realiĝis: Ĝis nun aperis 30 volumoj, kun multaj miloj da paĝoj kaj senprecedence bela fizika prezento. Siatempe oni suspektis, ke malantaŭ la PVZ kaŝas sin tuta teamo da fakuloj anstataŭ izolita idealisto, kiu ie en Kioto savas por ni kaj la postaj generacioj la radikojn kaj la unuan periodon de nia historio

Raúl JUÁREZ SEDEÑO, la plej malnova esperantisto nuntempe en Kubo, naskiĝis la 2-an de oktobro 1926 en Camagüey, kie lia patro estis la UEA-delegito. La lingvon li tamen lernis nur post la morto de sia patro, helpe de libroj el la hejma biblioteko. En la kvindekaj jaroj li komencis aktivi en la kuba movado, instruante ekde 1957 kaj fariĝante UEA-delegito kaj landa peranto en 1958.




Post la kuba revolucio en 1961 Juárez Sedeño estis preskaŭ la sola kuba esperantisto, kies nomo restis internacie konata. Interalie li korespondis kun alilandanoj, esperantigis kubajn poemojn kaj novelojn, peris la revuon *Paco* kaj daŭrigis instrui Esperanton al interesitoj. Lia fidela agado ludis rolon en la reviviĝo de la kuba movado en 1971. Intertempe li faris ankaŭ amason da esploroj pri la historio de Esperanto en Kubo.

Pedro Pablo LAMAS DÍAZ naskiĝis la 18-an de oktobro 1929 kaj esperantistiĝis en 1962, kiam li estis gimnazia instruisto pri ekonomiko. Li fondis la unuan Esperanto-grupon en sia provinco kaj lerte eluzis la rimedojn de radio-elsendoj, revuoj, instruado,

personaj intervenoj ĉe la Ministerio pri Edukado k.s. por disvastigi intereson kaj scion pri la lingvo tra la sesdekaj kaj sepdekaj jaroj. Kiel Juárez Sedeño li estas ĝenerale konsiderata kiel "patro" de la hodiaŭa forta kuba movado kaj kunfondinto de Kuba Esperanto-Asocio. De 1971 ĝis 1984 li rolis kiel UEA-peranto en Kubo, kunlaboris kun ILEI kaj flegis la disvastiĝantan movadon en sia provinco. Li ankoraŭ posedas imponan kolekton de Esperanto-libroj, kiuj daŭre estas je la dispono de seriozaj studentoj.

ŝtatan subvencion por reeldoni *Kalevala* en Esperanto. En 1985 aperis liaj rememoroj en la finna, *Perintö* (Heredaĵo), en kiu unu ĉapitro temas pri lia Esperanto-agado.

WONG Kenn naskiĝis en 1894 en Kantono, Ĉinio, kaj jam 18-jara fariĝis membro de UEA. Profesie li estis beletristo el tiu generacio, kiu laboregis por starigi kulturajn ligojn inter Ĉinio kaj la cetera mondo. Li fariĝis internacie konata dum sia studrestado en Liono, Francio (1921-1925), interalie per prelegoj ĉe la Universalaj Kongresoj



Fotoj de maldekstre:
Lamas Díaz, Juárez
Sedeño, Lehtivaara,
Itô, Wong.

Oskari LEHTIVAARA, naskita en 1909, estas blinda ekde sia sepa jaro. Kun eksterordinara persisto li akiris multflankan klercon kaj dum pluraj jardekoj servis kiel organizanto kaj ĵurnalisto en finnaj blindulaj asocioj. Jam 13-jara li eklernis Esperanton, kaj de 1937 ĝis 1982 li oficis kiel vicprezidanto de Esperanto-Ligo de Finnaj Blinduloj, kies prezidanto li nun estas. En 1950 li kunfondis Ligon Internacian de Blindaj Esperantistoj (LIBE), kies sekretario li estis ĝis 1962. Ankaŭ al la ĝenerala finna movado Lehtivaara faris grandan kontribuon. En 1957 li iniciatis kaj kunredaktis plurlingvan bildlibron *Finnlando hieraŭ kaj hodiaŭ*, kie aperis ankaŭ Esperanto. Li estis membro de la LKK de la 54-a UK en Helsinko (1969), estis komitatano de UEA (1969-1981), kaj tutan jardekon (1975-1985) prezidis Esperanto-Asocion de Finnlando. Lia organiza lerto helpis akiri por EAF propran sidejon, aranĝi la eldonon de Setälä-medalo kaj havigi grandan

de 1924 kaj 1925. En 1924 li estis elektita al la Lingva Komitato kaj la Centra Komitato de la Esperantomovado. Post sia reiro al Kantono li ricevis universitatan postenon por instrui filologion, lingvistikon kaj Esperanton, fondis Esperanto-Instituton de Kantono kaj kungvidis la fortan kantonan movadon. En 1926 aperis lia ampleksa studo pri la scienca aplikado de Esperanto kaj en 1929 lia verko *Ĉinio kaj la problemoj de Esperanto*, ambaŭ en la ĉina lingvo. Komence de la tridekaj jaroj li kunlaboris pri la redaktado de *Enciklopedio de Esperanto*.

La tumultaj jaroj de milito kaj revolucio portis Wong al Honkongo, kie li restas ĝis hodiaŭ. De 1955 li reaktiviĝis en la movado, kaj estis elektita al la Akademio de Esperanto (1962-1970). Lia elekto kiel Honora Membro venas multe pli malfrue, ol li meritas, sed feliĉe lia longa vivo ebligis al UEA korekti tiun eraron kaj inde danki la longvivan pioniron.

Por registri niajn trezorojn

Eble ne ĉiuj niaj legantoj konscias, ke Terminologia Esperanto-Centro (TEC) de UEA jam de unu jaron havas oficejon kaj salajratan sekretarion en Zagrebo, Jugoslavio. Sed ne nur tion: TEC havas ankaŭ ideojn kaj planojn, kiuj tuŝas la tutan movadon. Ĉi tie ni publikigas la skizon de ĝia unua granda projekto – kaj aldonas la rimarkon, ke jam la Centra Oficejo de UEA kunlaboras kun TEC rilate la katalogadon de la Biblioteko Hodler. Nederlanda “civilservanto” (t.e. rifuzanto de la deviga militservo) Rob Keetlaer ekde la 2-a de oktobro laboras plentempe en la biblioteko, konsulte kun nederlandaj kaj Esperantaj fakuloj.

La sekva propono estas direktita al Esperantaj bibliotekoj kaj bibliotekistoj. Oni konsciu, ke la celo de TEC estas, ke la laboro okazu kaj ke bibliografio estu farata, ie ajn, ne nepre en TEC. Ĝi volas provoki diskuton, sed ankaŭ agon. Se iu havas pli bonan proponon, TEC volonte transdonus la laboron. Ĉiuj interesitoj estas petataj reagi. Informoj, proponoj kaj kritikoj estas bonvenaj.

La bibliografia defio

Ĉiam la esperantistoj multe fieris pri la riĉeco de la literaturo kaj publikaĵoj en Esperanto. Aparte tio tuŝas niajn bibliotekojn kaj kolektojn, en kiuj estas troveblaj libroj kaj esperantaĵoj el la tuta mondo.

Tiu trezoro en niaj bibliotekoj ja ekzistas. Sed ĉu, en la nova informadika epoko, ni kontentiĝu per nuraj onidiroj pri ĝia riĉeco? Nuntempe tre gravas informoj pri la ekzisto kaj atingebleco de bezonataj verkoj. La plej efika maniero establi tiun informfluron estas elektronike katalogi niajn kolektojn. Multaj niaj bibliotekoj konscias tiun problemon, sed havas nek homan nek financon forton por plenumi la laboron.

Aparta problemo estas elekto de la bazaj principoj de la planata laboro. Komputiligo ne konsistas nur el aĉeto de komputilo kaj elekto de programaro, kvankam ankaŭ tio estas grava paŝo. En ĉi tiu kazo, komputiligo signifas la kreon de tuta sistemo por dokumentado, klasifiko, prilaboro kaj disdonado de informoj. Tiun sistemon Esperantaj bibliotekoj devus trastudi kune. Bonvena, kvankam ne nepre,

estus interkonsento pri komunaj normoj; minimume necesas kunordigita agado. Jam pasis la tempo, kiam oni traktis informojn kiel sekretan trezoron – ja ili valoras tiom, kiom multe oni povas atingi, uzi kaj interŝanĝi ilin.

Por fari bone, fari komune


Sekvante la bazajn celojn de sia agado – la organizado de la terminologia laboro kaj la normigado de la faka lingvaĵo en Esperanto – Terminologia Esperanto-Centro de UEA

*Jam pasis la tempo,
kiam oni traktis
informojn kiel sekretan
trezoron – ja ili valoras
tiom, kiom multe oni
povas atingi, uzi kaj
interŝanĝi ilin.*

planas formi Bibliografian Sekcion. Tiu celos kolekti informojn pri vortaroj kaj terminaroj, pri faka literaturo en Esperanto kaj pri la terminologia literaturo en diversaj lingvoj. Kiel bazan elementon en sia strategio, TEC iniciatas projekton pri komuna bibliografio de Esperantaj publikaĵoj.

La avantaĝoj por la Esperanta komunumo estas jenaj:

1. *Unuecigo de homaj kaj financaj rimedoj.* TEC prizorgos la komputilon kaj programaron, kaj la TEC-sekre-



tario konstante kontrolas la realigon de la projekto. La kostoj estos dividitaj laŭ interkonsento, inter la 5-6 bibliotekoj, kiuj komence partoprenos en la projekto.

2. *Unuecigo de bibliografiaj principoj.* La ellaboron de normo por komuna katalogo faros komisiono, kiu konsistos el la Bibliografia Sekcio de TEC kaj la gvidantoj de la kunlaborantaj bibliotekoj. Tiu ĉi normo estos uzata nur por informfluo inter diversaj E-institucioj; ĝi ne estos deviga por ilia interna uzo.

3. *Ellaboro de diversaj katalogoj.* Per bona komputila programo oni

UEA havas kunlaborajn rilatojn kun ISO

La 3-an de oktobro 1990 Universala Esperanto-Asocio kaj la Internacia Organizo por Normigado (ISO) establis kunlaborajn rilatojn. UEA estas registrita kiel aktiva partoprenanto (“kategorio A”) en la laboro de Teknika Komisiono 37 (TC 37), kiu okupiĝas pri la principoj kaj kunordigo de terminologio je monda skalo. La rilatojn prizorgos Terminologia Esperanto-Centro en Zagrebo.

Estas notinde, ke fine de 1989 nur 15 internaciaj organizaĵoj havis rilatojn en kategorio A kun TC 37. Inter ili troviĝas la Internacia Asocio por Aplika Lingvistiko, la Komisiono de Eŭropa Komunumo, la Internacia Federacio de Tradukistoj, la Internacia Federacio de Bibliotekaj Asocioj, kaj tri organoj de Unuiĝintaj Nacioj (inter ili Unesko).



Maldekstre, Rob Keetlaer kaj la Biblioteko Hodler; supre, Hispana E-Muzeo. Ĉu la grandaj movadaj bibliotekoj trovos rimedojn kaj emon por kunlabori?

Prelegantoj serĉataj por IKU

En la kadro de la 76-a UK en Bergen okazos la 44-a sesio de Internacia Kongresa Universitato (IKU). Universitataj lekciistoj kaj simile kvalifikitaj personoj rajtas proponi prelegon, pri iu ajn scienca temo, al la komisiono pri IKU ĝis la 31-a de decembro 1990. Por kandidatiĝi oni sendu pasport-formatan foton kaj kvar kopiojn de la prelegresumo plus biografio kaj bibliografieto al: Internacia Kongresa Universitato, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Prelegantoj ricevos modestan honorarion sed ne repagon de vojaĝkostoj. Ili devas mem prizorgi sian aliĝon al la kongreso. Oni aparte invitas proponojn de junaj universitataj profesoroj kaj instruistoj, kiuj ankoraŭ ne prelegis en IKU. Estus bonvene se la prelegoj traktus iun el la aspektoj de la kongresa temo "Nordio – ĉu modelo?"

povas produkti diversajn katalogojn el la samaj informoj. Laŭ la postuloj de unuopaj bibliotekoj, estos realigeblaj katalogoj laŭ aŭtoro, laŭ jaro, laŭ enhavo kaj simile. Eblos ankaŭ presi slipojn por biblioteka katalogo. Ĉiu biblioteko rajtos mem difini la aspekton de la fina rezulto, laŭ siaj bezonoj.

4. *Helpo al privatuloj kaj malgrandaj bibliotekoj.* La posedantoj de personaj kolektoj kaj la gvidantoj de aliaj bibliotekoj havos la eblecon trovi siajn posedaĵojn en la baza bibliografio kaj tiel, paŝon post paŝo, ordigi kaj katalogi siajn verkojn. Por tiu laboro komputilo ne estas nepre. Kunlabore kun UEA aŭ alia institucio oni povos laŭplane helpi al etaj sed tre valoraj bibliotekoj, aŭ al tiuj, kie katalogado estas malfacile realigebla pro ajna kaŭzo.

5. *Kompleta E-bibliografio.* Multaj esperantistoj revas pri bibliografio de ĉiuj esperantaĵoj – libroj, gazetoj, diskoj, sonbendoj, afiŝoj ktp. Ni ne devas timi tiun longdaŭran projekton: ĝi estas farebla paŝon post paŝo, gravas ke ni kunlaboru kaj celu same.

Pri la konkreta realigo

Por havi bonan, fruktodonan kunlaboron, oni devas klare difini la principojn de la kunlaboro.

La celo kaj espero de TEC estas, ke

la bibliografio estu farita. Tiusence, la projekto apartenas ne al TEC sed al ĉiuj esperantistoj. Se iu alia organizo havas pli bonajn planojn kaj kondiĉojn por realigi ĝin, TEC bonvenigus tion. Cetere, pro la amplekseco de la aliaj agadoj de TEC, ĝi ne povas financi la tutan projekton. Tial estos necese dividi la kostojn. Aliflanke, ĉar TEC jam havas profesian sekretarion, tiu povos

*Ni ne devas timi
tiun longdaŭran
projekton: ĝi estas
farebla paŝon post paŝo,
gravas ke ni kunlaboru
kaj celu same.*

kontroli la realigon de la projekto kaj helpi en la solvo de eventualaj problemoj. En la TEC-oficejo en Zagrebo estas je dispono komputilo, eta biblioteko, pluraj materialoj pri bibliografiado ktp.

La bibliografiisto ne havos administrajn taskojn: li aŭ ŝi okupiĝos plentempe pri la projekto. Por klare difini la disdividon de kostoj, taskoj,

sed ankaŭ de la rezultoj de la laboro, la kunlaborantaj bibliotekoj kaj TEC subskribos kontrakton. La financa plano estu tia, ke la enspezoj kovru la elspezojn, kaj oni antaŭvidos disdividon de eventuala profito pro la vendado de diversaj katalogoj.

La unua etapo konsistos el esploroj. Ĉu ekzistas jam iuj elektronikaj E-bibliografioj? Kiaj estas la kondiĉoj, bezonoj, proponoj kaj postuloj de la bibliotekoj? Kiaj estas la teknikaj ebloj por informinterŝanĝo pri ekzistantaj bibliografioj ktp? En tiu etapo oni devos ankaŭ fondi la komisionon por realigo de la projekto.

La konkreta laboro konsistos el la enkomputiligo de bazaj bibliografiaj informoj laŭ jam ekzistantaj bibliografioj, laŭ etapoj. Post la fino de ĉiu etapo (ĉu laŭ jaro, ĉu laŭ aŭtoro) la rezulto estos dissendita al bibliotekoj, kiuj povos kontroli la informojn kaj aldoni siajn proprajn indikojn. La rezultojn oni kunmetos kaj fine eldonos, unue pri apartaj kategorioj, fine en kompleta formo.

Pliajn informojn oni povas trovi en TEC-bulteno n-ro 7 (1990). Ĉiuj interesoj kaj eventualaj kunlaborantoj estas petataj kontakti la TEC-oficejon, Pk. 499, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.

Ankica Jagnjić

La kluboj estas niaj alfabetigejoj

La 15-a de decembro estas tradicie ankaŭ tago por aĉeti, donaci, legi, pritaksi kaj ĝenerale festi la Esperantan libron – nemalhaveblan eron de nia kulturo, eĉ en epoko de son- kaj vidbendoj, deko da internaciaj radio-elsendoj kaj centoj da renkontiĝoj jare. Taŭga okazo, eble, por prezenti al niaj legantoj la Libroservon de UEA. La afero facile aranĝiĝas: mi ekstaras, paŝas el ĉambro Aŭstralio al la ŝtuparo, malsupreniras ĝis la ĉefpordo, turniĝas dekstren kaj trovas min tie. Ĉe mia flanko, bunta montrofenestro. Kaj ĉie alie: libroj.

Preskaŭ cent mil eldonaĵoj

Densa volumamaso ŝtopas kvindek metrojn da bretoj. Trimil ducent titoloj, taksas Pasquale Zapelli, la minca kaj nigrahara, trankvilvoĉa itala junulo kiu de du jaroj gvidas la plej grandan kaj kompletan librovendejon de la movado. Kvankam de la plimulto li stokas nur tri ĝis ses ekzemplerojn, entute li tenas preskaŭ cent mil eldonaĵojn en valoro de pli ol duonmiliono da guldenoj. “Kompreneble la plej multaj titoloj vendiĝas tre malrapide. Estas precipe niaj propraj eldonaĵoj [de UEA], kiuj regule ricevas mendojn . . . kvankam foje estas esceptoj. Ekzemple kelkaj libroj de Hungara Esperanto-Asocio, Nemere-aĵoj, aperis jam antaŭ iom da jaroj sed ankoraŭ oni aĉetas ilin. Iuj klasikaĵoj daŭre vendiĝas. Foje ankaŭ venas iu furoraĵo kiel *La bona lingvo*. Sed multe pli ofte, libro iom vendiĝas en la jaro post la apero kaj poste forgesiĝas.”

“Ĉu la nova katalogo, kiun ni dissendis kun la Jarlibro, helpis revigligi la vendadon?”

“Jes, ĝi vekis ian intereson pri forgesitaj libroj de antaŭ du aŭ tri jaroj, sed amasa reago tamen ne estis. Certe mi ne vidis novajn klientojn, kiel mi atendis. Kaj nun . . . nu, mi ne memoras alian periodon, kiam mi devis atendi la poŝton por plenumi mendojn.”

Momenta silento. Jen grava novaĵo por unu el la plej gravaj enspezfontoj de la Asocio – 276 000 guldenoj (malnete) en 1989. Fakte la Libroservo donas nur malgrandan (aŭ nenian) profiton post subtraho de ĉiuj kostoj, sed ĝi almenaŭ ne signife ŝarĝas la aliajn agadojn de UEA kaj konsistigas valoran servon en si mem. Sed se la esperantistoj mem


ĉesus legi kaj aĉeti . . .

“Kiom da mendoj vi kutime plenumas tage?”

“Temas eble pri deko, sed tiuj tre varias. Niaj plej oftaj klientoj estas la grandaj libroservoj en Japanio, Francio, Usono, kelkaj aliaj landoj – lastatempe ankaŭ brazilanoj, ĉar BEL reorganizis sian libroservon en tre efika maniero. Do, ne estas multaj regionoj en la pagipova mondo, kie ni ne havas iun libroservan partneron. Sed kompreneble, al la grandaj koncentriĝoj de esperantistoj en orienta Eŭropo, same

de legemo en la okcidentaj socioj, ĉu? Ankaŭ en naciaj medioj oni aŭdas maltrankvilajn voĉojn. Ĉu eble viaj netekstaj varoj – mi celas: sonbendoj, vidbendoj ktp – pli bone vendiĝas?”

“Nu, en la lastaj jaroj ilia kvalito rimarkinde plialtiĝis – kelkaj kasedoj de junaj muzikistoj, ekzemple el Brazilo, aŭ la produktaĵoj de LF-koop, atingis normalan komercan nivelon. Sed ĝenerale ili obeas la samajn regulojn, kiel la libroj: foje venas furoraĵo, kiel la kasedo de Kajto, sed plej ofte temas pri momenta interesiĝo kiu forvapiĝas post nelonge. La vidbendoj entute ne bone vendiĝas. Ni eĉ ne mendas stokojn de ĉiuj haveblaj, ĉar ili estas ofte tre multekostaj. La ceteraj ‘diversaĵoj’ male havas daŭran popularecon – filatelaĵoj, insignoj kaj simile. Tie la problemoj koncernas la



kiel en la evoluantaj landoj, ni apenaŭ sendas librojn. Simple la homoj tie ne povas toleri niajn prezojn.”

“Sed la kongresoj povas iom kompensi tion, ĉu ne? Mi memoras ke Varsovio portis grandan libroservan sukceson, kaj ni sendis multajn librojn al Havano.”

Stafeto stagnas

“Pli ol ses mil! Tamen ni sendis precipe tiujn proprajn eldonaĵojn, de kiuj ni havas grandan stokojn, kaj ni tute ne sukcesis forvendi ilin ĉiujn. Restas ankoraŭ multaj nevenditaj volumoj en Kubo. Ekzemple, la Stafeto-libroj, kiuj furoris antaŭ dudek aŭ tridek jaroj kaj kiujn ni lastatempe reeldonis, nun stagnas: la homoj ne plu konscias pri ilia valoro.”

“Aŭ eble temas pri ĝenerala perdo

elekton el granda gamo de varoj kaj la malgrandan profiton.”

Mi embarasiĝas. Ĉi tiu intervjuo, destinita por la Tago de la Esperanta Libro, ŝajne taŭgas pli por la Tago de la Esperanta Insigno. Haste mi serĉas alian temon.

“Ni parolu iom pri la teknikaj aspektoj. Lastatempe unu el niaj legantoj plendis, ke ŝi devis atendi tutan monaton por ricevi menditan libron. Kio povus esti la kaŭzo de tio?”

“Povus esti diversaj kaŭzoj, depende de la specifa mendo kaj ankaŭ de la periodo de la jaro. Ekzemple, ĉi-jare de la mezo de majo ĝis la kongreso mia ĉefa okupo estis la kongresa libroservo: elekti librojn, mendi mankantajn, prezumi, paki . . . Fari tion kun ses mil volumoj prenas iom da tempo! Poste mi estis unu monaton en Havano. Dum

tiaj laboroj mi aŭ alia oficisto ankaŭ plemumas mendojn, sed evidente pli malrapide ol dum normala periodo. Kaj tra la tuta jaro mi havas diversajn taskojn krom la mendoj: mi devas mem mendi de la eldonejoj, registri, stoki, movi, kaj eventuale kunlabori pri nova katalogo, pri reklamoj kaj ankaŭ fari inventaron ĉe la jarfino. Do, kutime ne eblas tuj plenumi mendon en la tago de alveno. Sed, krom se temas pri iu komplika mendo aŭ pri iu elĉerpita verko, la atendado kutime ne estas tiom longa.”

“Ĉu daŭras longe por rehavigi elĉerpitan verkon?”

“Kutime ne pli ol unu monaton, kiam temas pri eŭropaj eldonejoj – sed ofte multe pli longe de ekster Eŭropo. Pro tio ni ofte mendas pli da ekzempleroj de eldonejoj sur aliaj kontinentoj. Sed estas ankaŭ eldonejoj, precipe tiuj amatoraj, kiuj neniam plenumas nian mendon – aŭ eĉ ne sendas al ni tiun senpagan ekzempleron, kiun ni bezonas por decidi, ĉu mendi aŭ ne.”

Kiel vigligi la merkaton?

“Jes, la informfluo lamas, kiel ofte en la movado. Fakte tio estas unu el viaj grandaj problemoj, ĉu ne? – ke multaj esperantistoj neniam vidas la librojn, eble eĉ ne konscias pri ilia ekzisto. Kiel laŭ vi ni povus plibonigi tiun situacion?”

“Nu, unue, mi estas imponita de la brazila sperto. Por grandaj landoj, la brazila sistemo de lokaj libroservoj povus multe kontribui al vigligo de la merkato. Eble vi povus foje peti artikolon de ili . . . Sed krome, laŭ mi la sola vere efika rimedo estus tio, ke la lokaj kluboj pli aktive uzu la haveblajn katalogojn, librorubrikojn kaj recenzojn. Eĉ reklamoj atingas nur limigitan grupon, dum la kluboj atingas preskaŭ ĉiujn. Se oni regule trafolumus la libro-oferton dum la klubkunvenoj, eble legus kelkajn elĉerpaĵojn aŭ recenzojn, devus kreski la aĉetemo.”

“Vi celas, ke la kluboj devas funkcii samtempe kiel bibliotekoj, librokluboj kaj lernejoj – kvazaŭ alfabetigejoj de nia kulturo?”

“Jes, ĝuste. Vi mem skribis en januaro pri la bezono de pli profunda legipovo, kaj la kluboj estas nia ĉefa rimedo por atingi tion. Sed mi ne scias, kion pli ni mem povus fari. La afero dependas precipe de tiuj niaj membroj, kiuj pretas kontribui sian sperton al lokaj programoj kaj kapti la intereson de la homoj por novaj eldonaĵoj. Nur tiam ni povus havi relative normalan kaj sanan merkaton.” mf

Vizitantoj dum la 73-a Universala Kongreso admiras la montrofenestron de la Libroservo.




ABONLISTO DE LA LIBROSERVO DE UEA

Krom vendi librojn, Pasquale okupiĝas ankaŭ pri la perado de revuabonoj. Entute 47 periodaĵoj jam aranĝis tian peradon kun UEA, kies konta sistemo estas perfekte adaptita al la bezonoj. Jen konciza listo de ili, kun interkrampe kelkaj indikoj pri la eldonanta landa aŭ faka asocio, aŭ pri la temaro de la revuo se tio ne evidentiĝas el la titolo. Ni volonte akceptos viajn abonojn – sed ankaŭ proponojn de pliaj periodaĵoj, kiuj serĉas internacian abonantaron.

<i>Ateismo</i> [ATEO]	16,00	<i>Jugoslavia stelo</i>	20,00
<i>Boletín</i> [hispana]	27,00	<i>Juna amiko</i> (por lernejanj)	10,00
<i>Brita esperantisto, La</i>	34,00	<i>Kancerkliniko, La</i> (ajnista)	37,00
aerpoŝta aldono	7,00	<i>Koko</i> (jugoslava literaturo)	20,00
<i>Bulgara esperantisto</i>	32,00	<i>Koncize</i> (okc.-eŭropa junularo)	12,00
<i>Dia regno</i> [KELI]	21,00	<i>Kulturaj kajeroj</i>	
<i>Ekonomia bulteno pri Usono</i> ...	22,00	(kastelo Grésillon)	25,00
<i>El Popola Ĉinio</i>		<i>Kvakera esperantisto</i> [KES]	15,00
1 jaro	35,50	<i>Language Problems and</i>	
2 jaroj	61,00	<i>Language Planning</i>	
3 jaroj	85,00	individuaĵ abonoj	54,00
<i>Enigma</i> (spritaj ludoj)	33,00	instituciaĵ abonoj	105,00
<i>Esperanta mormonaro</i> [PEM] ..	20,00	<i>Letero de la Akademio</i>	
<i>Esperantista vegetarano</i> [TEVA]	12,00	<i>de Esperanto, La</i>	40,00
<i>Esperanto, L'</i> [itala]	23,00	<i>Literatura foiro</i>	58,50
<i>Espero el Koreujo, La</i>	24,00	aerpoŝta aldono	18,00
<i>Espero katolika</i> [IKUE]	42,00	<i>Medicina internacia revuo</i>	30,00
<i>Espero, La</i> [sveda]	33,00	<i>Monato</i> (aktualaĵoj)	62,00
<i>Evangeliaj kajeroj</i>	24,00	aerpoŝta aldono	15,00
<i>Fenomeno</i> [nederlanda]	30,00	<i>Norvega esperantisto</i>	18,00
<i>Fonto</i> (literatura)	30,00	<i>Oomoto</i> [EPA]	18,00
<i>Franca esperantisto</i>	50,00	<i>Perspektivo</i> [ĉeĥoslovaka]	18,00
<i>Gazeto, La</i> (mondkultura)	46,00	<i>Sano</i> (ĉeĥa medicina)	10,50
aerpoŝta aldono	8,00	<i>Scienca revuo</i> [ISAE]	27,00
<i>Heroldo de Esperanto</i>	43,00	<i>Sennacieca revuo</i> [SAT]	13,00
aerpoŝta aldono:		<i>Sennaciulo</i> [SAT]	52,50
Eŭropo	7,00	<i>Simpozio</i> [filozofio: FAT]	11,00
Mediterraneo	16,00	<i>Svisa Esperanto-revuo</i>	40,00
Ameriko, Azio	20,00	<i>TEJO-tutmonde</i>	15,00
Oceano	30,00	<i>Tutmondaj scienco kaj tekniko</i>	
<i>Iltis-Forumo</i>		1 jaro	14,00
(literatura/interlingvista)	29,00	2 jaroj	25,00
<i>Internacia Celado por</i>		3 jaroj	36,00
<i>Eduko Moderna per Esperanto</i>			
(Freinet-metodo)	27,00		
<i>Internacia pedagogia revuo</i>			
[ILEI]	13,00		
<i>Jaro, La</i> (supl. <i>Monato</i>)	8,00		
aerpoŝta aldono	2,00		

Bonvolu noti: Ĉar ne ĉiuj revuoj komunikis al ni sian abonkotizon por 1991, kelkaj el la indikitaj ciferoj estas provizoraj.



100 pri cent. Cent anekdotoj pri cent famaj homoj. Andrzej Pettyn. Varsovio: Ritmo, 1989. 46p. 20cm. Amuzaj tekstetoj kun pollingvaj glosoj, por progresantoj. 6,00 gld.

4 * (4 * 4). Rumanaj poemoj. Div. aŭtoroj, el la rumana trad. Ionel Onet. California: Bero, 1990. 80p. 22cm. Liberformaj mallongaj poemoj el la komenco de la okdekaj jaroj en Rumanio. 10,60 gld.

A e i o u de la Internacia Lingvo. José Añó Belda. Valencia: la aŭtoro, 1988. 62p. ISBN 84 404 2217 2. 21cm. Ilus. Rektmetoda lernolibro por infanoj, kun hispanlingva antaŭparolo. 6,00 gld.

Anatomia nomenklatur. Tradukis kaj kompilis Li Kexi, André Albault. Revizio kaj antaŭparolo de Huang Ying. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1989. 10+696p. ISBN 75 0520 037 2. 26cm. Bind. Traduko de la 5-a eldono de *Nomina anatomica*, kun ekvivalentoj por pli ol ses mil latinaj terminoj en la angla, franca, ĉina kaj Esperanto. La terminoj estas aranĝitaj laŭ korpopartoj, kaj sekvas alfabetaj indeksoj por ĉiuj kvin lingvoj. 51,00 gld.

Ankaŭ pri esperantaĵoj! Ergoto de Bonaero (ps.). Buenos Aires: Argentina Esperanto-Instituto, 1990. 72p. 17cm. Proprastilaj versaĵoj kaj tekstoj pri aktualaj movadaj temoj. 4,50 gld.

La apokolokintozo de l' Dia Klaŭdio. Seneca (ĉ. 4 a.K.-65 p.K.), el la latina trad. Gerrit Berveling. Breda: VoKo (n-ro 7), 1990. 21p. 18cm. Senbrida satiro pri la romia imperiestro Klaŭdio kaj ties postmorta eniro en la ĉielon. 4,20 gld.

La arbo . . . kiu forkuris. Martin Burkert (1967-). Japana traduko de Kitagawa Hisasi. Tokyo: Libroteko Tokio, 1990. 38p. 26cm. Kolorilus. Dulingva. Kiam la sola arbo en griza urba strato forkuras, la loĝantoj ekkonscias pri sia medio . . . 19,20 gld.

La armeo de Hirohito. Notoj de japanaj militkrimuloj. Div. aŭtoroj, el la japana trad. Japana Pacdefenda Esperantista Asocio. Numazu: Biblioteko Kolombo, 1990. 200p. 18cm. Konfesoj pri kruelaĵoj faritaj nome de la japana imperiestro dum la dua mondmilito. Kiel apendico aperas la Konstitucio de la Imperio de Japanio kiu validis de 1889 ĝis 1947. 15,00 gld.

Eklampsio en remizo (1984). David Albahari. El la serba trad. Zlatoje Martinov. Beograd: Serba Esperanto-Ligo, 1990. 62p. 20cm. Mikronoveloj postmodernaj: la leganto mem devas eltrovi/krei la sencon de ĉiu rakonto. 9,90 gld.


Das erste Jahrzehnt der Weltsprache Volapük (1889). Rupert Kniele. Editoris kaj postparolas Reinhard Haupenthal. Saarbrücken: Iltis, 1989. 168p. ISBN 39 2761 312 6. 20cm. Germanlingva historieto de la unua jardeko de la Volapük-movado: fotorepresita kun novaj notoj, bibliografio kaj nomindekso. 52,20 gld.

Esperanta versfarado kaj rimaro (1909). J. Parisot, Th. Cart. Saarbrücken: Iltis, 1990 (2-a eld.). 44p. ISBN 39 2761 314 2. 20cm. Pionira poetika studo. 9,30 gld.

Esperanto en funkcioj. Andrzej Pettyn. Krakovo: Pola Esperanto-Asocio, 1988. 182p. 20cm. Progresiga lernolibro por internacia uzo, kun 27 ĉapitroj pri la uzo de Esperanto por esprimi difinitajn sentojn (timon, repaciĝon, intencon ktp), abundaj citaĵoj el la Proverbaro kaj glosaro pri 666 "bazaj verboj". 9,00 gld.

La eta kato, kiu ne volis morti (1925). La infanlernejo de Prelles, el la franca trad. Lentaigne. Beauville: SAT-Broŝurservo, 1990 (2-a eld.). 16p. 21cm. Ilus. Simpla malgaja rakonteto. 2,10 gld.

Fajron sentas mi interne. Ulrich Matthias. Vieno: Pro Esperanto, 1990. 98p. 21cm. Romaneto pri junulo, kiu serĉas homajn kontaktojn kaj vivcelon, interalie en la Esperanto-movado de la okdekaj jaroj. 15,90 gld.



Faux amis, faux parents, "étrangers". Beauville: SAT-Broŝurservo, 1990. 64p. 21cm. Gvidilo pri radikoj en Esperanto, erarigaj por franclingvanoj. 6,30 gld.

La filo. Marianna Debes Dahl. El la fera trad. Jeffrei Henriksen. Ilustrita de Olivur Við Neyst. Tórshavn: Fannir, 1990. 24p. 23cm. Bela rakonto el la militaj jaroj: ĉu soldatfilo helpas repreni konfiskitan gitaron? 15,90 gld.

Flustras Hiroŝimo. Div. aŭtoroj, el la japana trad. Tanaka Sadami. La tradukinto, 1990. 118p. 18cm. Rememoroj de "hibakuŝoj" – travivintoj de la atombombo. 10,80 gld.

Fragmentoj de Heraklito, La. El la helena trad. Gerrit Berveling. Breda: VoKo, 1990. 32p. 21cm. Malgranda aro da postrestintaj citaĵoj de la fama antaŭsokrata filozofo. 4,80 gld.

Grammaire ABC d'espéranto. Christiane de Vleminck, Émile van Damme. Antwerpen: Association belge pour l'espéranto/FEL, 1990. 313p. ISBN 90 7120 530 4. 21cm. Moderna, klara gramatiko por franclingvanoj; la aŭtoroj "provis pravigi ĉiujn regulojn", tamen ne kaŝante kelkajn dubajn punktojn kaj evitante pretendojn al kompleteco. 51,00 gld.

Ĝis la homaranismo. Iom reviziita plena verkaro de L.L. Zamenhof, originalaro 2: Somero. 1896-1906. Kioto: Ludovikito, 1990. 975+34+42p. 22cm. Bind. Dua volumo de trivoluma kronologia kompilaĵo, kun indekso al ĉiuj tri volumoj kaj ampleksa postparolo. 120,00 gld.

Historiaj popol-rakontoj de Ikuno. Horii Morizō. El la japana trad. Okumura Rinzo. Ōsaka: la tradukinto, 1990. 100+12p. 18cm. Gvidlibro en unika stilo pri unu el la plej malnovaj loĝlokoj de Japanio. Mapo kaj fotoj ilustras la kvindek rakontojn, kiuj kovras periodon de ĉ. du mil jaroj. 8,40 gld.

Homoj – tiaj kaj aliaj. Ankaŭ strangulo restas homo. Wendelin Überzwerch (ps.). El la germana trad. Alois Meiners. Messkirch: Armin Gmeiner, 1989. 92p. ISBN 39 2663 322 0. 16cm. Ilus. Noveletoj el la jaroj 1920-30, gaje rakontitaj kaj plenaj de leĝera ironio. 9,30 gld.

Liriko intima. Jana Cíchová, komp. R. Vlková. Brno: La Progreso, 1988. 20p. 20cm. Ilus. Divershumoraj, simplaj versaĵoj. 5,40 gld.

Migrante tra metioj (1982). Valo (ps. de Raymond Laval, 1900-). Laroque Timbeaut: Broŝurservo de SAT, 1990 (2-a eld.). 111p. 21cm. Mimeo. La tria en kvarvoluma aŭtobiografio pri la vivo de anarkista fervojisto, teknikisto k.a. 10,20 gld.

Praevangelio laŭ Jakobo, La. El la greka trad. Gerrit Berveling. Breda: Voĉoj Kristanaj 21, 1990. 16p. 21cm. Teksto el la apokrifaj, verkita en la dua duono de la dua jarcento p.K. 2,10 gld.


Spiritaj mesaĝoj. Pietro Ubaldi. El la itala trad. Walter A. Francini. Petrópolis: Spirita Eldona Societo Lorenz, 1989. 44p. 21cm. Pri etiko kaj religio. 4,50 gld.

DIVERSAĴOJ

Disko: Eterna muziko. Kantas ensemblo "Eterna muziko". Leningrad: Melodia, 1989. 33 t/m. Okcidenteŭropa kaj antikva rusa ĥormuziko en Esperanta traduko. La dua flanko konsistas el longa poemo de Puŝkin, "Graŝ Nulin", deklamita de Oleg Popkov. 15,00 gld.

Kasedo: A e i o u de la Internacia Lingvo. José Añó Belda, 1988. Akompanas la samnoman rektmetodan lernolibron por infanoj. 7,80 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18,5% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!



Ne eĉ bonintencaj mitoj

Laŭ la ĉefartikolo en n-ro 9 nia kongreso en Havano estis granda sukceso malgraŭ kelkaj malglataĵoj sprite kaj amuze priskribitaj en la kongresaj raportoj kaj piednotoj. Kompreneble ankaŭ mi ĝojas kiam la decido kongresi en Kubo kroniĝis per feliĉa rezulto.

La aŭtoro de la ĉefartikolo skribas i.a. ke "eĉ se pravas tiuj, kiuj asertas, ke Fidel [Castro] malatentas iujn homajn rajtojn en sia lando, li kompetente kaj kuraĝe atentigas aliajn, inter kiuj estas la rajto je komunikado..." Sed ĉu oni vere povas nomi heroo de komunikado ŝtatestron kiu malpermesas ĉiun opozicion, maltolas kontraŭoficialajn opiniojn kaj silentigas ĉiujn kritikantojn? Ni ne kreu novajn mitojn, eĉ bonintence; almenaŭ pri tio instruas nin *La danĝera lingvo* de Ulrich Lins.

Eskil Svane (Francio)

Verŝajne prezidento Fidel Castro kapablis sorĉi ĉiujn esperantistojn, kiuj partoprenis la kongreson, ĉar ĉiuj Esperanto-revuoj uzis spacon por fanfaroni tion. Kompreneble ankaŭ vi tion faris. Vi eĉ subfotobilde parolas pri la kuba prezidento fratece aŭ kamaradece kiel "Fidel". ... Ĉu vi ne ekpensis, ke per fanfaronado pri "unu gajnita amiko" vi eble forpuŝos amason da antaŭaj, eĉ pagintaj membroj de la Esperanto-movado?

Legante la septembran numeron mi miris, kial ne estas informoj pri la venontaj okazaĵoj de la Esperanta mondo. ... Nun kiam ni devus varbi novajn membrojn al UEA, estas malfacile motivi esperantistojn fariĝi individua membro se la revuo rakontas nur pri la pasinteco. ... Laŭ mia opinio estus pli bone, se oni povus rakonti pri la pasinta Universala Kongreso en du-tri apartaj numeroj por ke en ĉiu numero estu ankaŭ informoj pri aliaj aferoj. Ĉiu numero de *Esperanto* estas ankaŭ reklamo de nia movado kaj povas esti la sola, kiun ricevas nova esperantisto, tial la enhavo devus esti multflanka. Ĉi tio kiel espereto por venontaj jaroj.

Synnöve Mynttinen (Finnlando)

La memoro de TEJO

Eble estas iom maljuste tro akre kritiki la junularan Esperanto-movadon (septembro, p. 174-5). TEJO havas eĉ ne unu laboranton. Neniu vere prizorgas la TEJO-poŝtaĵojn en la Centra Oficejo; TEJO estas preskaŭ neekzistanta en la revuo de UEA. Ĉio kuŝas sur la ŝultroj de tre malmultaj homoj. Estus amasego por fari kaj multon oni jam faris laŭ mia kompreno, sed kio estu la "memoro" de

TEJO, por konservi la sciojn dum la jardekoj kaj disdoni ilin laŭbezzone? En TEJO, kiel en ĉiuj junularaj organizoj, la homoj ŝanĝiĝas. Estas libretoj por aktivuloj: kiu scias ke ili ekzistas? Ĉu la kontaktoj inter eks-TEJO-anoj kaj TEJO ne iom mankas, almenaŭ praktike? Eble la pli granda, pli forta plenkreskula movado ne timu kunhelpi.

Anna Ritamäki (Finnlando)

Eksonimoj kaj iredentismo

En la rubriko "Reagoj", junio 1990, rumano Ionel Onet protestas kontraŭ uzo de la hungara nomformo de la rumana urbo Odorheiu Secuiesc. ... Onet avertas, ke oni ne uzu ĉi-specajn hungarajn loknomojn, ĉar, unue, ili ne estas troveblaj sur mapo de Rumanio kaj, due, ĉar malmultaj poŝtistoj en Rumanio parolas la hungaran lingvon. ...

Bedaŭrinde, Onet ... timeme kaŝas la veran motivon de la uzo de la hungara eksonimo (alilande uzata loknomo, diferenca de la kutima enlanda nomo) por adreso en Rumanio. Temas pri formo de iredentismo esprimita per lingva rimedo. Ja ekzistas kelkaj landoj, en kiuj troviĝas urboj kun nomoj en du lingvoj: Turku/Åbo en Finnlando, Biel/Bienne en Svislando, Bruxelles/Brussel en Belgio. En ĉi tiuj ekzemploj, ambaŭ nomoj havas oficialan statuson. Male, en Rumanio la hungara lingvo ne estas oficiala: ĝi estas minoritata lingvo same kiel la germana.

*La altrudo de
tiuj nomoj por
eksterlanda uzo
estas interpretebla
kiel esprimo de
iredentisma sinteno.*

Kiam post la unua mondmilito la antaŭa hungara teritorio de Transilvanio fariĝis parto de Rumanio, la hungaraj loknomoj estis anstataŭigitaj per rumanaj nomoj, jen per tuta aŭ parta traduko, jen per rebapto. ... Kvankam en Hungario oni daŭre uzas parole kaj skribe la hungarajn nomojn, la altrudo de tiuj nomoj por eksterlanda uzo estas interpretebla kiel esprimo de iredentisma sinteno.

La kazo de Székelyudvarhely/Odorheiu Secuiesc ne estas izolita ekzemplo de naciisma sento en Esperanta periodaĵo. En *La migranto* 2/1989, p.9-10, hungara aŭtorino aperigis artikolon kun la incita titolo: "Vizitinda Pozsony (Hungario)".

Ekde la estiĝo de la respubliko de Ĉeĥoslovakio en 1918, tiu urbo ne plu troviĝas sur hungara teritorio kaj ĝia nomo fariĝis oficiale Bratislava. En *Esperantisto slovaka* 1/1990, p.10-11, V. Duran ... karakterizas la erarigan artikolon kiel "misuzon de Esperanto kaj ŝovinisman trompon de la redaktoro". ... En *Debrecena bulteno* 1989, n-ro 51, p.16, redaktoro Tibor Papp ... aldonis jenan komenton: "En la nunaj politikaj cirkonstancoj iuj eĉ kuraĝus menciadi pri iaspeca iredentismo ...". Tiel, ambaŭflanke de la landlimo aŭdiĝas akuzoj pri ŝovinismo kaj iredentismo!

Ĉar *La migranto* estas la organo de TANEF (Turista Asocio "La Natur-amikoj" Esperanto-Fako), unu el la funkciuloj de tiu organizaĵo provis defendi publikigon de la ofenda artikolo. En sia rebato (*Debrecena bulteno* 1989, n-ro 54, p.7), redaktoro Papp faris trafan aludon al la nuna situacio en Rumanio: "Mi kore invitas vin por rigardi tie hungarajn historiajn vidindaĵojn. Se vi ne trovas ilin sur la mapo de Hungario, mi klarigas al vi (nur al vi!), ke ili troviĝas sur la mapo de la nuna Rumanio ...". Sekvas la rumanaj nomoj de la historiaj hungaraj urboj.

Por ke la revuo *Esperanto* ne estu akuzita estontece pri apogo de ŝovinismo kaj iredentismo, estas necese, ke la redakcio zorge kontrolu ĉiujn kontribuaĵojn por elsarki eksonimojn en kunteksto, kie ili ne rilatas al historiaj okazintaĵoj sed povas servi por esprimi la naciismajn sentojn de la aŭtoroj.

Bernard Golden (Hungario)

Tago ankaŭ de liriko


Niaopinie la prezento de nia eldonaĵo *Aerlumo* dum la Tago de la Libro en Havano (septembro, p.162) ne estis "mislokita muzika paŭzo". Laŭ la Kongresa Libro kaj la invito prezentita en la decembra numero de la revuo, la Tago de la Libro "celas prezenti novajn librojn, diskojn, kasedojn kaj aliajn eldonaĵojn". Krome, ni antaŭinformis pri nia partopreno la kongresan sekretarion kaj la estraron pri kulturo. Do, ni petis la aŭtoron de la verko prezenti nian eldonaĵon en la aranĝo. Kaj same kiel la elstara aktorino Vida Jerman deklamis fragmentojn de la prezentataj libroj, tiel ankaŭ Flávio Fonseca kantis pecojn de sia kasedo, partoprenante la centran temon de la Tago de la Libro.

Francisco M. Oliveira
(BEL-Libroservo, Brazilo)

La unuan fojon

La revua numero 5, kies tuta enhavo estis asignita al la raporto de la Estraro, por la unua fojo estis tute legita de mi kaj pluraj aliaj pro la nova formo de aranĝo. Vere dankindas!

Reza Kheir-Khah (Irano)



Ĉu aglutina aŭ . . . intertipa?

La aglutinaj lingvoj kaj Esperanto. André Cherpillod. Eldono de la aŭtoro, 1988. 24p. 21cm. Prezo: 5,10 gld.

Tiu malgranda libro starigas grandan problemon – unu el la eternaj por esperantologio: kiel karakterizi Esperanton laŭ la lingva tipologio? A. Cherpillod unue klasigas ĉiujn lingvojn de la mondo laŭ la tri bone konataj strukturaj tipoj. (Tion li faras iom malĝuste, ĉar li ne hezitas meti plenajn lingvofamiliojn en unu saman tipologian klason kvazaŭ ili jam “denaske” apartenas al ĝi kaj ne povas konvertiĝi en alian strukturan tipon.) Surbaze de tio li komparas Esperanton kun la tri tipoj por eltrovi similecojn kaj diferencojn.

Liaj konkludoj estas atentindaj: Esperanto estas “la tipo mem de aglutina lingvo” (ĉefe pro la nevarieco de siaj morfemoj), sed samtempe ĝi estas “eĉ pli aglutina ol la aglutinaj lingvoj” (ĉefe ĉar ĝi favoras memstaran uzeblon de siaj elementoj: aĵo, ulo, ino, ema, igi ktp) kaj eĉ “ne estas aglutina” (ĉar ĝi tamen evitas longajn sintezojn de siaj morfemoj).


Tiu prezento estas teorie multpromesa, ĉar la aŭtoro tiamaniere evitas perfortan enklasigon de Esperanto en nur unu tipon. Fakte, Esperanto, mi kredas, intermiksas trajtojn de ĉiuj tri tipologiaj klasoj. La aŭtoro tute prave konstatas (p. 23), ke por lernantoj de Esperanto ĝi unuavide aspektas fleksie. Kial? Ĉar, diras la aŭtoro, “ĝia leksiko estas ĉefe latinida, aŭ almenaŭ eŭropa, kaj la eŭropaj lingvoj estas fleksiaj”. Mi opinias, ke por tiu impreso estas ankaŭ aliaj kaŭzoj. Ekzemple, en veraj aglutinaj lingvoj la disigebleco de morfemoj ofte estas la sekvo de la *koincido de morfemaj kaj silabaj limoj*. En la turka, la silabdistingo (ev-ler-de) estas la sama kiel la morfemdistingo (ev/ler/de). Tio ne estas la kazo de la latina (tem-po-ra kaj tempor/a) kaj ankaŭ ne de Esperanto (mal-la-bo-re-mu-loj kaj mal/labor/em/ul/o/j). Do ĝuste tiu trajto kunigas Esperanton kun fleksiaj lingvoj.

La aŭtoro prave notas, ke “Zamenhof neniel parolis pri aglutineco” de Esperanto (p. 23). Tamen ĉu nur pro

tio ke “li sciis neniun aglutinan lingvon”? Miakomprene, li ne parolis pri aglutineco ĝuste pro tio, ke li *parolis pri izoleco* de sia lingvo. Vere, jam en la Unua Libro Zamenhof prezentas Esperanton kvazaŭ imitaĵon de la ĉina: ĉiu morfemo, laŭ Zamenhof, estu konsiderata kiel memstara *vorto*, do ĝuste same kiel en la ĉina lingvo.

Se oni revenos al tiaj bazaj pensoj de Zamenhof kaj trovos ilin konformaj al la nuna reala Esperanto, do verŝajne oni devos konkludi ke Esperanto estas fakte *intertipa*, havante esencajn trajtojn de ĉiuj tri tipologiaj klasoj. Kaj ĝuste tio faras ĝin universale akceptebla.

Sergej Kuznecov (Sovetunio)



Bela afrika donaco

Mi vizitis grandan urbon. Gbeglo Koffi. Goiânia: Zamenhof Editores, 1989. 42p. 21cm. Prezo: 10,50 gld.

Jen unu el la maloftaj originalaj verkoj de afrikanoj en Esperanto. La enhavo: togolanda vilaĝano vizitas la ĉefurbon Lomé kaj pasigas kelkajn tagojn ĉe sia filo. La leganto multon lernas pri la sociaj cirkonstancoj en tiu lando. La freŝa, simpla, alloga stilo bone peras la afrikan pensmanieron. Kelkaj esprimoj estas por mi nekutimaj, sed bone kompreneblaj kaj originalaj: flarilo (= nazo), ŝpruci okulakvon (= plori), revilaĝeniĝi, ĵusaĉetindaĵo, bonvenigantaro.

Pro la enhavo kaj la bela kovrilo la libro estas bona donaceto. Espereble ĝi ne estos la lasta libro de Gbeglo Koffi.

Walter Klag (Aŭstrio)

Taksi provante

Orienta speciala Diina masaĝo. Koksosto-ĝustiga prem-kneda terapio. Masayuki Saionji (1943-). Pekino: Xue Yuan, 1989. 192p. ISBN 79 0060 461 6. 19cm. Prezo: 27,60 gld.

Jen libro, ne por vin distri, sed por vin ĝisfunde instrui pri terapio multe pli simila al fizioterapio aŭ ĥiropraktiko ol al masaĝo. La aŭtoro, evidente sana kaj imponaspekta mezaĝulo, rigardas vin de sur la interna kovrilo. Li asertas, ke mislokiĝo de la koksostoj estas ne nur ege ofta (999 el 1000 homoj suferas ĝin iugrade) sed eĉ baza problemoj, kiu, se ĝi ne estas korektita, vanigas ĝustigon de la skeleto kaj de internaj organoj: . . . *ĉiuj malsanoj trovas sian originon en la malnormaliĝo de la koksostoj* (p. 7). Konsekvence li faras ambician diron: . . . *la koksosto-ĝustiga prem-kneda terapio havas rimarkindajn efikojn sur ĉiujn malsanojn kaj mi povas konvinki vin, ke viaj malsanoj ne estas escepto* (p. 55). Sed paciento ne atendu tujan miraklon: la terapio devas ripetiĝi, kelkfoje okdekoble.

Kiel oni testu tiun aserton? Nura legado neniel sufiĉas: oni devos ja elprovi la metodon. Tion plifaciligas elstare bonaj ilustraĵoj, kaj principe la instrukcioj estas facile sekveblaj. Sed mi trovis, ke mi ne kuraĝas daŭrigi sen spertula konsilo, ĉar manipuli la vertebrojn de ekzemple la nuko ne estas leĝera ludo. Krome mi spertis, ke por plenumi kelkajn instrukciojn mi devus dum kelka tempo plifleksebligi mian propran korpon: vidu la ilustraĵon. Kiom da “okcidentuloj” povus sen antaŭtrejnado fari tiun manovron?

Malgraŭ tio mi volonte lernus pli pri tiu terapio. La parto de la libro, kiu temas pri memtrejna gimnastiko (kun la neklarigita subtitolo “DIINO BICS”), ŝajnas al mi tute sendanĝera kaj rekomendinda al ĉiuj.

Lingve la libro ne estas senmanka, sed la kompreno apenaŭ suferas pro tio, ke ekzemple “polmoj” ofte iĝas “palmoj” aŭ ke akuzativoj kondukas iom kaprice.

Iuj neesperantistaj amikoj miaj montris agrablan surpriziĝon, ke per nia lingvo oni povas akiri tian libron.

Trevor Steele (Aŭstralio)

Ĉu forgesigi la zorgojn?

Ŝanco por feliĉo. Phil Bosmans. El la nederlanda trad. Lydia Kerremans. Tiel: Lannoo, 1988. 93p. ISBN 90 2091 528. 21cm. Ilus. Prezo: 19,80 gld.

La optimisto-biblio. Karlo Bolo. El la germana trad. Hermano Bermano. Paderborn: Esperanto-Centro Paderborn, 1989. 163p. ISBN 39 2257 058 5. 21cm. Prezo: 22,20 gld.

Precize kiam mia lando (GDR), neatendite por ĉiuj – do ankaŭ por mi – dronis en krizon profundan; kiam mi perdis mian identecon kaj mem troviĝis en kriza stato, ĝuste tiam atingis min ĉi tiu recenzo-tasko. Imagu la sentojn miajn: sur mia skribotablo kuŝis *Ŝanco por feliĉo* (ŜF) kaj *La optimisto-biblio* (OB), kaj ĉirkaŭ mi regis ĥaoso, necerteco kaj timo. Senhezite mi eklegis:

*Ne forgesu la belajn tagojn!
Ĉar kiam vi forgesas ilin,
ili neniam revenos!
Tute enmanigu vin mem, kaj
plenigu vian kapon per ĝojaj pensoj,
vian koron per pardonemo,
tenereco kaj amo
kaj vian buŝon per rido,
kaj ĉio denove boniĝos.* (ŜF, p. 85)

Danke mi fermis miajn okulojn kaj revis pri la belaj pasintaj tagoj, sed telefonvoko krude rompis la belajn bildojn kaj mia frato sciigis al mi, ke li estas senlabora kaj ke la pensio de nia patrino ne plu sufiĉas por ŝia restado en pensiula hejmo. . . .

Sed:

*Forgesu, kio kuŝas malantaŭ vi.
La hodiaŭo estas pli grava.*

(OB, p. 153)

Do mi revenis al la nuno kaj kune kun mia frato lamentis pri la dissolvo de nia ŝtato, pri la okupacio de GDR fare de la valora germana marko, pri nia serĉo al nova identeco, pri niaj timoj rilate la estontecon. Skrupule mi poste demandis min, kian valoron havas libroj, kiuj disvastigas saĝaĵojn ĝeneralajn, kvazaŭ biblio? Ĉu ili forgesigu la banalan vivon ĉiutagan?

Ĉu ili meditigu nin? Mi absolute ne scias la respondojn kaj same ne komprenas, kiaj estas la motivoj de la homoj, kiuj aĉetas tiajn librojn (Bosmans vendis jam pli ol 2 000 000 da ekzempleroj). Estu kiel estas: kiam la libroj tiom disvendiĝas, tiam indas aperigi ilin ankaŭ en Esperanto. La lingvaĵo de ambaŭ estas senriproĉa, kaj kiu emas al vortludoj kaj proverboj, tiu trovas ĉi tie trezoron. Ĉu ankoraŭ specimenon? Do jen:

*Fariĝu via kutimo, komenci la tagon
per feliĉecoseno. Vi estos tiom feliĉa,
kiom vi mem decidis, ke vi estu.*

(OB, p. 83).

Malgraŭ tio, ke preskaŭ ĉio en la du libroj kontraŭas plej simplajn regulojn kaj procedojn en la scienca psikoterapio kaj psikologio, mi amuziĝis kaj konsideras ilin pliriĉigo de nia literaturo.

Hans Eichhorn (Berlin/GDR*)

* *Atentu la tri literojn: Povas esti, ke lastfoje vi ilin legas.*

Bunto, fervoro kaj talento

Nesto de birdoj. Literatura antologio. Kunmetis Nikola Pilev, Penju Stojanov. Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1987. 231p. 22cm. 15,30 gld.

Pri literaturo kaj Esperanto en la bulgaraj urbo kaj distrikto Haskovo temas *Nesto de birdoj*, libro subtitole nomanta sin "Literatura antologio". La leganto ne lasu sin fortimigi de la du antaŭparoloj (de A. Miĥajlov kaj N. Uzunov), kiuj pro sia socialisma patoso jam anakronismiĝis – se konsideri la aktualajn politikajn eventojn. La unua parto de la libro, prezentanta poemojn, rakontojn kaj prozajn fragmentojn de pli ol trideko da lokaj verkistoj (tradukitaj de deko da esperantistoj), montriĝas jam ne nura galerio de realsocialisma krearto sed male: apud himnoj kaj prozaĵoj pri liberigaj bataloj, konstruo de nova socio kaj patriotismaĵoj sternaĝas bunta paletro de verkoj pri homsopiroj, amo,

natur, saĝoj kaj rakontoj popolaj k.a.


La dua parto konsistas el 15 poemoj kaj unu prozfragmento, ĉiuj originale verkitaj en Esperanto de la haskova poetotriopo Penjo Stojanov, Nikola Pilev kaj Nikola Uzunov. Enkonduka eseo de G. Miĥalkov donas fonajn sciojn pri la poetoj, montras, kiel ĉiu el ili emfazas alian temon kaj lokas iliajn verkojn en la bulgarakajlaĝenerala Esperanto-literaturo.

En la lasta, tria parto de la libro, nome historia skizo de la Esperantomovado en la haskova distrikto, sinsekvas historiaj raportoj pri la Esperanto-agado en Haskovo, Harmanli, Svilengrad, Dimitrovgrad, Simeonovgrad, Ljubimec kaj aliloke kune kun skizo de la laboro de la Distrikta Estraro de BEA, funkcia ekde 1966. Multaj fotoj ilustras tiujn

historiojn pri la unuaj entuziasmaj komencoj, la dum- kaj intermilitaj suproj kaj faloj kun persekutoj kaj persistoj, la postmilitaj rekomencoj sub novaj kondiĉoj kaj pri pli aŭ malpli grandaj progresoj ĝis hodiaŭ. Aperas multe da fervoruloj kaj sindediĉintoj, estas priskribataj diversaj eventoj, atingoj kaj distingo. Oni certe nur malofte trafos regionan Esperantomovadon tion atente kaj detale konservintan sian estintecon.

La tuta libro, bone legebla malgraŭ kelkaj ĝenaj teknikaj mankoj, tiel trioble plenumas sian celon esti "... malgranda fenestro, tra kiu la legantoj pli bone vidus, ekkonus kaj espereble ekŝatos nian regionon" (G. Miĥajlov en sia antaŭparolo).

Bernhard Westerhoff (FR Germanio)



"Inter homoj, montetoj jen Haskovo staras . . ."



Brazilo:

Internacia Bienalo de la Libro

Brazila E-Ligo unuafoje havis standon en la 11-a IBL, la plej granda librofoiro en Latinameriko, de la 25-a de aŭgusto ĝis la 2-a de septembro. Kiel parton de la longdaŭraj preparoj, BEL publikigis okulfrapan anoncon en kvalita librorrevuo (130 000 ekzempleroj), pretigis novan enkondukan kurson, kaj trejnigis plurajn deĵorontojn en la budo.


Germanio: Omaĝo al Einstein

La 9-an de septembro okazis solena inaŭguro de bronza tabulo en Nürnberg, FRG, honore al la 100-a datreveno de la morto de Leopold Einstein. Ĉeestis i.a. vicprezidanto de UEA Ulrich Lins kaj monumentologo Hugo Röllinger, kiu faris la inaŭguran paroladon. Röllinger substrekis la pioniran rolon de Einstein en diversaj flankoj de la movado: prezidanto de la unua klubo, eldonisto de la unua revuo, aŭtoro de kompara studo inter Esperanto kaj Volapük. Esperanto-Grupo Nürnberg petas gratulajn

bildkartojn, leterojn, transdonotajn al la urbestro: p/a Anny Hartwig, Pirckheimerstr. 11, D-W-8500 Nürnberg.

Italio: Radikala subteno

En la inaŭgura kunsido de la 61-a Itala Kongreso, la 25-an de aŭgusto, deputito en la Eŭropa Parlamento Marco Pannella esprimis la subtenon



de la Transnacia Radikala Partio al Esperanto. Li instigis la esperantistojn fari konkretajn proponojn por pli-grandigi ĝian rolon en Eŭropa Komunumo, promesante la subtenon de "almenaŭ kelkaj dekoj" da parlamentanoj. La kongreson ĉeestis ankaŭ Radikala Radio, kiu dissendis plurajn intervjuojn kaj debatojn al centmiloj da italaj aŭskultantoj.

Japanio: Subteno por azia agado

Pli ol sescent homoj aliĝis al la 77-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj, de la 24-a ĝis la 26-a de aŭgusto en Jokohamo. Prelegis i.a. gastoj el Litovio, Bulgario, Irano kaj Koreio, kaj UEA-estrarano pri azia agado So Gilsu sukcesis varbi monhelpon por membrigi en UEA 45 esperantistojn el nepagipovaj aziaj landoj.

Pakistano: Pli ol 70 kongresanoj

De la 9-a ĝis la 11-a de aŭgusto okazis la somera kunveno de Pakistana E-Asocio en la montara urbo Murree. La ĉeesto de pli ol 70 homoj, kaj viraj kaj inaj, atestis la lastatempan vigliĝon de la landa movado. Pluraj pakistanaj urboj nun posedas aktivan lokan grupon, kaj E-vojaĝantoj estas ĉiam tre bonvenaj. Skribu al la ĝenerala sekretario de PakEsA ĉe la jarlibra adreso.

Turkio: Yalçın nova prezidanto

La 9-an de septembro okazis en Istanbul la 6-a Kongreso (eble pli ĝuste: jarkunveno) de Turka Esperantista Asocio, kun partopreno de 17 enlandanoj kaj krome po du gastoj el Irano kaj Usono. Kiel nova prezidanto estas elektita Enver Yalçın (ankaŭ la UEA-peranto en Turkio), kaj la nova asocia adreso jenas: Kurtdereli cad., Ebru sok. şirin, Erses apt. 1/4, Üstgöztepe, Istanbul.

Nekrologoj

Francisco De Souza ALMADA

(1898-1990), Honora Membro de UEA, mortis fine de junio en Santos, Brazilo. Vaste konata kiel instruanto, informanto kaj organizanto de la brazila movado, li estis ankaŭ pli ol kvardek jarojn delegito de UEA kaj financa subtenanto de la Asocio. Li verkis lernolibron por portugallingvanoj kaj grave kontribuis al la enkonduko de Esperanto en la studtemaron de universitato Juiz de Fora. En 1971 aperis lia traduko de la aŭtobiografio de la pinta brazila futbalisto, *Mi estas Pelé*, kaj estis ankaŭ li kiu varbis la subtenon de Pelé por Esperanto.

Rafael FIOL PAREDES (1891-1990),

esperantisto de okdek jaroj, forpasis la 25-an de februaro en Sevilla, Hispanio. Li estis dum jardekoj delegito de UEA kaj organizanto de la loka movado.

Pedro GONZALEZ CANTERO, Dumviva

Patrono de UEA kaj malavara mecenato de la internacia movado, mortis julie en Burgos, Hispanio, post longa malsano.

Vlasta HORÁKOVÁ (1922-1990),

fakdelegito pri pedagogio en Nová Dubnica, Ĉeĥoslovakio, mortis la 12-an de marto. Ŝi estis tre aktiva en la loka kaj regiona movado, interalie kiel senlaca instruisto.

Franz KNOBLOCH (1913-1990) forpasis en junio. Li estis malnova membro de UEA kaj delegito en Münchberg, Germanio.

Fjodor Jakovlevič (Teodoro) KULAGIN

(1898-1989) mortis la 13-an de junio pasintjare en Moskvo. Li estis esperantisto de 1912.

Josep ROFES MESTRE (1926-1990)

forpasis en Barcelono, Hispanio, la 8-an de junio. Libro-amanto kaj instruisto, li estis ankaŭ unu el la kunfondintoj de Hispana Esperanto-Instituto.

Veera TIETTI (1921-1990), la delegito en

Somero, Finnlando, forpasis en septembro. Delegito ekde 1955, ŝi tre aktive subtenis la lokan kaj internacian movadojn, interalie per elstara informa laboro en la loka gazetaro. Ankoraŭ ĉi-jare ŝi "kaptis" por UEA tri novajn membrojn.

Guy B. TORDOFF (1907-1990) forpasis la

11-an de aŭgusto en Bristol, Britio. Dum sesdek jaroj li aktivis en la movado kiel instruisto kaj loka organizanto, kaj estis ankaŭ dum longa tempo respondeculo de Kvakera Esperantista Societo.

Louise VERTONGEN-XHAYET (1910-

1990) forpasis la 5-an de septembro en Eupen, Belgio. Ŝi estis multjara delegito de UEA, sperta instruisto kaj organizanto de la loka movado.

Fake

Ĉenleteroj: Konsilinde forĵeti

Germana legantino lastatempe sendis al la Centra Oficejo kopion de anonima ĉenletero verkita en Esperanto. La letero postulas per fantaziaj minacoj, ke la ricevanto plusendu 20 kopiojn ene de kvar tagoj. Ni esperas, ke ĉiuj niaj membroj estas sufiĉe saĝaj por senhezite enrubujigi tiuspecaĵojn, kiuj eble ŝajnas amuzaj sed povas forte ĝeni aŭ maltrankviligi aliajn ricevantojn. En pluraj landoj ilia disvastigo estas malpermesata.

Kion signifas la junularo por vi?

Ĉu vi opinias ke junuloj estas tiuj homoj, kiuj plej multe bruaĉas dum la UK? Aŭ ĉu via koro ankoraŭ sentas sin dudekjaraga?

Kvankam ili foje ŝajnas iom bruemaj, la junaj esperantistoj serioze okupiĝas pri la plifortigo kaj disvastigo de Esperanto. Multaj aktivas en siaj landaj asocioj, kaj kunlaboras en TEJO, la junulara sekcio de UEA. Tiel TEJO sukcesas i.a. ĉiujare okazigi la Internacian Junularan Kongreson kaj aliajn aranĝojn, kaj prizorgi la "Pasportan Servon" de gastigantoj en multaj landoj.

La internaciaj instancoj rekonas TEJO-kiel unu el la asocioj kiuj reprezentas la junularon, je eŭropa kaj tutmonda nivelo. Pro tio, TEJO povas organizi seminariojn kie internacia grupo de junuloj diskutas pri "Antaŭjuĝoj" (oktobro '89) aŭ pri "Marĝeniĝo de homgrupoj en la socio" (septembro '90) – kun Esperanto kiel oficiala laborlingvo.

Vi povas subteni TEJO-n kaj ĝian laboron, se vi fariĝas patrono de TEJO (aŭ dumviva patrono – vidu p. 32 kaj 39 de la Jarlibro). Vi ricevos niajn gazetojn *Kontakto* kaj *TEJO-tutmonde*, kaj ĝuos rabaton je niaj internaciaj renkontiĝoj. Ĉar ja tute ne estas malpermesate, ke vi venu kaj bruu kun ni.

Saskia Idzerda

TEJO-Estrarano pri Informado kaj Kulturo

Persone

MacGill:

Nun de loko flugas li al loko

La vicprezidanto de ILEI, Stefan MacGill, pasigis ĉi-jare preskaŭ pli da tempo ekster sia loĝloko Hungario ol en ĝi, tiel multe li vojaĝis instruociele. Du kursoj en Svislando kaj aliaj en Sovetunio, Norvegio, Svedio, Usono, Kubo kaj Francio: tiel aspektas la itinero de tiu posteulo de Cseh. Ĉar MacGill ankaŭ redaktas la revuon por lernejanaro *Juna amiko*, ne miru, se foje ĝia aperritmo ŝajnas iom kaprica...

Paredes: Ankaŭ "Ĉe"-estis...

Sekve de nia intervjuo kun Stefan MacGill pri la ILEI-konferenco en Kubo (septembro, p. 165), nepras aldone menci la nomon de Fernando Paredes, la kuba ĉefdelegito, kiu kune kun kvin aliaj trapasis la ekzamenon por Ĉe-instruistoj kaj sekve estas la unua rajtigita kuba praktikanto de tiu metodo.

Ekologio: E-resumoj en Nederlando

Du lastatempaj raportoj de la nederlanda Konsilantaro por Medi-kaj Naturesploro entenas resumojn en Esperanto. Unu raporto koncernas la konsekvencojn por la scienca esplorado, kiujn portus la principo de "daŭrigebla disvolvo" de la socio; la alia, la distran utiligon de naturrezervejoj. Ambaŭ resumojn aŭtoris Bert de Wit. Kopiojn disponigas la Centra Oficejo kontraŭ pago.

Eksteraj rilatoj:

Junaj E-parlamentanoj

La Centro por Politika Agado en la germana provinco Baden-Württemberg organizis meze de julio Eŭropan Junularan Parlamenton en Stuttgart. Inter la 129 partoprenantoj el 20 eŭropaj landoj troviĝis kvar delegitoj de Germana Esperanto-Junularo – ne nur du germanoj, sed ankaŭ ĉeĥino kaj hungaro. Laŭ unu el la partoprenantoj, "la ideo de Esperanto kiel komuna, liganta, neŭtrala dua lingvo interesis multajn kaj estis subtenata de preskaŭ ĉiuj." La tre bonaj interpretaj servoj dum la konferenco estis ankaŭ tre multekostaj.

Handikapitoj: Vigle en Ĉeĥoslovakio

De la 8-a ĝis la 12-a de junio, la Sekcio de Invalidoj de Ĉeĥa E-Asocio organizis internacian renkontiĝon en Slaný por festi sian kvinjariĝon. Partoprenis 88 esperantistoj, 14 el eksterlando. La Sekcio, fondita en 1985

de 24 esperantistoj-handikapitoj, havas nun pli ol 500 membrojn, plurajn fakajn rondetojn kaj monatan organon, kaj organizas diversajn renkontiĝojn. Kunlabore kun Agado E3 (vd. la septembran numeron, p. 164), la Sekcio kolektis jam pli ol 5800 okulvitrojn kaj 1300 optikajn vitrojn por vidhandikapitoj en Afriko.

Medicino:

Japana masaĝisto en Jugoslavio

Masayuki Saionji, aŭtoro de *Orienta speciala Diina masaĝo* (vd. p. 219), prelegvojaĝis post la 75-a UK en Pollando kaj Jugoslavio kun granda sukceso. En Beograd, ekzemple, li demonstris sian metodon al preskaŭ 140 terapiistoj en la Instituto por Rekapabligo, kaj pli ol 50 tuj poste anoncis sin por kurso en februaro 1991. Sekve de tiu granda interesiĝo, la studenta klubo sukcesis organizi Esperanto-kurson por medicinistoj. Serbokroata versio de la libro de Masayuki jam aperis.

Lingvoplanado: Galega seminario

La Galega Kulturkonsilio organizas internacian seminarion pri lingvoplanado, 25-28 septembro 1991 en Santiago de Compostela, Hispanio. Ĉeftemo estos la problemoj de malpli grandaj regionaj lingvoj. Informoj: I Seminario Internacional sobre Planificación Lingüística, Consello da Cultura Galega, Apartado 773, E-15705 Santiago de Compostela.



Turismo:

MT ekde nun en Bydgoszcz

Monda Turismo, la ĉefa Esperanta faka asocio pri turismo, translokis sian sidejon de Bruselo al la pola urbo Bydgoszcz, kie ĝi fariĝis kvazaŭ internacia fako de la pola firmao Esperantotur. Fakte temas pri formalligo de jam ekzistinta situacio, ĉar dekomence Esperantotur kaj ĝiaj polaj karavanoj estis la motoro de MT. Delegitoj el 21 landoj partoprenis la 16-an Internacian Forumon de E-Turismo, de la 23-a ĝis la 29-a de septembro en Bydgoszcz (foto). MT havas kunlaborantojn jam en almenaŭ 30 landoj.

Esperanto en radio

Ĉiujn informojn pri radio bv. sendi al la redaktoro de ĉi tiu rubriko: s-ro Georges Larglantier, 29 bvd. Murat, F-75016 Paris, Francio. Ĉi-sube estas la elsendhoroj laŭ Universala Tempo (UTC), antaŭe nomata Grenviĉa Meza Tempo (GMT).

ĈIUTAGE

05.00-05.30 Warszawa, 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 41.27m (7270 kHz), 31.01m (9675 kHz). Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, Poŝkesto 46, PL-00-950 Warszawa, Pollando.
11.00-11.25 Warszawa, 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 31.50m (9525 kHz), 25.34m (11840 kHz).
11.00-11.30 Beijing, 43.13m (6955 kHz), 31.64m (9480 kHz). Radio Beijing, Esperanto-fako, Beijing, Popola Respubliko Ĉinio.
13.00-13.30 Beijing, 25.75m (11650 kHz), 19.78m (15165 kHz).
15.30-15.55 Warszawa, 49.22m (6095 kHz), 25.39m (11815 kHz).
17.30-18.00 Warszawa, 48.90m (6135 kHz), 41.18m (7285 kHz), 31.45m (9540 kHz).
20.00-20.30 Beijing, 40.16m (7470 kHz), 31.58m (9500 kHz), 30.10m (9965 kHz).
21.30-21.55 Warszawa, 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 49.22m (6095 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27m (7270 kHz), 41.18m (7285 kHz).
22.00-22.30 Beijing, 30.49m (9840 kHz), 26.05m (11515 kHz).

LUNDE

13.30-13.40 Bern, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz). Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.
23.00-23.30 Vilnius, 25.45m (11790 kHz), 21.99m (13645 kHz), 19.76m (15180 kHz), 19.41m (15455 kHz), 19.37m (15485 kHz). Nur kvar minutojn (kutime la finajn) kadre de anglalingva elsendo. Litova Radio, Esperanto-fako, SU-232674 Vilnius, Litovio, Sovetunio.

MERKREDE

01.15-01.25 Bern, 49.22m (6095 kHz), 48.90m (6135 kHz), 31.09m (9650 kHz), 30.35m (9885 kHz), 24.93m (12035 kHz), 16.92m (17730 kHz).

03.15-03.25 Bern, 48.90m (6135 kHz), 31.09m (9650 kHz), 30.35m (9885 kHz), 24.93m (12035 kHz).
07.45-07.55 Bern, 31.38m (9560 kHz), 21.92m (13685 kHz), 16.98m (17670 kHz), 13.83m (21695 kHz).
10.45-10.55 Bern, 22.00m (13635 kHz), 19.27m (15570 kHz), 16.83m (17830 kHz), 13.78m (21770 kHz).
13.15-13.25 Bern, 40.11m (7480 kHz), 25.65m (11695 kHz), 22.00m (13635 kHz), 19.27m (15570 kHz), 16.83m (17830 kHz), 13.83m (21695 kHz).
15.15-15.25 Bern, 21.92m (13685 kHz), 19.44m (15430 kHz), 16.83m (17830 kHz), 13.87m (21630 kHz).
17.15-17.25 Bern, 30.35m (9885 kHz), 25.09m (11955 kHz), 19.32m (15525 kHz), 16.83m (17830 kHz), 13.78m (21770 kHz).
22.15-22.25 Bern, 30.58m (9810 kHz), 30.35m (9885 kHz), 24.93m (12035 kHz), 19.27m (15570 kHz).

ĴAŬDE

05.40-05.55 Vaticano, 186m (1611 kHz), 40.73m (7365 kHz), 19.72m (15210 kHz). Radiovaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio.
13.30-13.40 Bern, kiel lunde.
21.20-21.30 Tallinn, 290m (1035 kHz), 50.63m (5925 kHz). Estona Radio, Esperanto-fako, SU-200100 Tallinn, Estonio, Sovetunio.
22.30-23.00 Vilnius, 451m (666 kHz), 49.18m (6100 kHz). Kvar minutojn, kiel lunde.

SABATE

13.30-13.40 Bern, kiel lunde.
20.00-20.20 Roma, 41.24m (7275 kHz), 30.90m (9710 kHz), 25.42m (11800 kHz). Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, Centro Corrispondenza, I-00100 Roma, Italio.
 Okfoje Bern, kiel merkrede.

DIMANĈE

04.05-04.30 Wien, 48.74m (6155 kHz), 21.85m (13730 kHz), 19.60m (15410 kHz). O.R.F., Esperanto-fako, A-1136 Wien, Aŭstrio.
08.00-08.20 La Habana, 25.35m (11835 kHz). Radio Habana Cuba, Esperanto-sekcio, Apartado 70-26, La Habana, Kubo.
09.20-09.30 Tallinn, kiel ĵaŭde.
09.50-10.00 Budapeŝt, FM 67.05 MHz, 67.97 MHz, 68.24 MHz, 68.36 MHz, 68.48 MHz, 68.72 MHz, 69.38 MHz, 70.10 MHz, 70.43 MHz, 70.64 MHz, 72.08 MHz. Programo preparita de Radio Pécs, Esperanto, Pf. 200, H-7601 Pécs, Hungario.
13.05-13.30 Wien, 48.74m (6155 kHz), 21.85m (13730 kHz), 19.44m (15430 kHz), 13.96m (21490 kHz).
17.00-17.30 La Habana, 25.63m (11705 kHz), 25.51m (11760 kHz), 25.38m (11820 kHz), 25.32m (11850 kHz), 25.06m (11970 kHz), 19.56m (15340 kHz).
18.30-19.00 La Habana, 25.10m (11950 kHz), 19.71m (15220 kHz), 19.44m (15435 kHz).
20.00-20.10 Vaticano, 570m (526 kHz), 196m (1530 kHz), 48.01m (6248 kHz), 41.38m (7250 kHz), 19.72m (15210 kHz), 16.94m (17710 kHz), 16.92m (17730 kHz), 13.86m (21650 kHz), kaj FM 93.3 MHz, 96.3 MHz, 103.8 MHz, 105.0 MHz (ankaŭ je festotagoj).
22.00-22.20 La Habana, 25.10m (11950 kHz), 19.71m (15220 kHz).
22.30-23.00 La Habana, 31.46m (9535 kHz), 25.19m (11910 kHz), 25.10m (11950 kHz), 25.06m (11970 kHz).
22.45-23.00 Zagreb, 262m (1143 kHz). Radio Zagreb, Esperanto-fako, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.

DIREKTITAJ ONDOJ

Bern: je la 01.15h al Centra Ameriko kaj nordo de Suda Ameriko; je la 03.15 al Centra kaj Norda Ameriko; je la 07.45h kaj 10.45h al Malproksima Oriento kaj Pacifiko; je la 13.15h al Proksima Oriento kaj Azio; je la 15.15h al Proksima Oriento kaj Orienta Afriko; je la 17.15h al tuta Afriko; je la 22.15h al Suda Ameriko. **La Habana:** je la 08.00h al Okcidenta Norda Ameriko kaj Pacifika Azio; je la 17.00h kaj 22.30h al Ameriko; je la 18.30h kaj 22.00h al Eŭropo kaj la Mediteranea regiono. **Beijing:** je la 11.00h al Japanio kaj Koreio; je la 13.00h al Sudorienta Azio; je la 20.00h al Eŭropo; je la 22.00h al Centra kaj Suda Ameriko. **Vaticano:** 15210 kHz je la 20.00h al Proksima Oriento; 17710, 17730 kaj 21650 kHz je la 20.00h al Afriko. **Wien:** 15410 kHz al Proksima Oriento; 15430 kHz al Malproksima Oriento; 21490 kHz al Okcidenta Afriko.

ALIAJ STACIOJ

(regiona aŭdebleco; horoj laŭ loka tempo)
Brasil: Sorocaba (ZYK669), 1080 kHz, sabate, 20.00-21.00h; Rio de Janeiro (ZYJ462), 1400 kHz, dimanĉe, 10.30-10.45h (Brazila Spiritisma Federacio).

ESPERANTLINGVAJ ELSENDOJ DUM LA JARO 1990

				Nombro	Daŭro
Aŭstrio	Wien	(25x2=)	50 min/sem	104	43.20
Brazilo	Rio de Janeiro		15 min/sem	52	13.
	Sorocaba		60 min/sem	52	52.
Ĉinio	Beijing	(30x4=)	120 min/tage	1460	730.
Hungario	Budapeŝt		10 min/sem	52	8.40
Italio	Roma		20 min/sem	52	17.20
Jugoslavio	Zagreb		15 min/sem	52	13.
Kubo	La Habana	(30x3 + 20x2=)	130 min/sem	260	112.40
Pollando	Warszawa	(25x4 + 30x2=)	160 min/tage (ĝis apr.)	720	320.
		(25x3 + 30x2=)	135 min/tage (de majo)	1225	551.
Sovetunio	Tallinn	(10x2=)	20 min/sem	104	17.20
	Vilnius	(4x2=)	8 min/sem	104	7.
Svislando	Bern	(10x19=)	190 min/sem	988	164.40
Vatikano	Vaticano	(10+15=)	25 min/sem	104	21.40

Entute por la jaro 1990: 5329 elsendoj dum 2072 horoj per 13 stacioj.

D-ro H. Raŝidi, fondinto de la Esperanto-movado en Afganistano, sciigas siajn amikojn, ke li havas novan adreson: Iran, Freiman Hospital. Novaj korespondantoj el la tuta mondo estas bonvenaj.

NARGES. Rita kaj Frans serĉas vin.

Serĉata: mezaĝa Esperanto-instruisto, kompetenta lingve, precipe prononce kaj lerta parolige por unu jaro en Qingdao-a Universitato. Vin anoncu al s-ro Dai Songen, Ĉina Esperanto-Ligo, P.O. Kesto 825, CN-100037 Beijing, Ĉinio.

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj *kostas unu guldenon (unu internacian respondkuponon)*. Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton por la ripeto de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj, bonvolu vidi la kolofonon.

Anoncetoj

S-ro Yaba Luntadila, B.P. 1972, Kinshasa 1, Zairio, serĉas filatelistojn

kiuj pretas vendi poŝtmarkojn de Zairio por li. Tiel la Esperanto-klubo, kies prezidanto li estas, disponos pri iom da mono.

67-jara eks-instruistino serĉas amikinojn tm. Ĉiu ricevos respondon. Jeanne Venema, Kaapbergweg 25, NL-7361 TG Beekbergen, Nederlando.

Bildkartojn por internacia vespero petas *tuj* nova Esperanto-fako de pedagogia altlernejo, edukonta E-instruistojn ĝis diploma nivelo. BDTF – Katalin Smidéliusz, Pf. 170, H-9701 Szombáthely, Hungario.

NOVAJ ORIGINALAJ ROMANOJ



Claude Piron: **DANKON, AMIKO!**
Nova lingvo-perfektiga romaneto kun aventura enhavo! Ĝi plaĉos ne nur al progresintoj kaj al ŝatantoj de Pirona-Valana prozo, sed ankaŭ al ĉiu amanto de klasike bela Esperanto. 36p., 9,60 gld.

Matthias, Ulrich: **FAJRON SENTAS MI INTERNE ...**
Originala romano de junulo – pri juna homo kaj lia vojo al Esperanto. 100p., 15,90 gld.

Mendu ĉe UEA aŭ PRO ESPERANTO, Postfach 28, A-1014 WIEN, Aŭstrio.

Ĉu vi jam konas tiujn librojn?

Petro Luiso: **La kanzonoj de Bilitino**; 55 p., 8 DM
(la famaj amrakontoj; tradukitaj de Petro Anselmo)

Hermano Boto: **Amuza legado pri Til' Strigospegul'**;
376 p., 36 DM

(ĉiuj 96 historioj; modela traduko kaj notoj de Rikardo Ŝulco)

Petro Anselmo: **La larmoj de Ifigenino**; 43 p., 8 DM
(originale en E-o verkita rakonto, iom simila al Robinso Kruso)

(Ĉiuj libroj lingve kontrolitaj laŭ la principoj de la Analiza Skolo)

Mendu ĉe UEA, ĉe via libroservo aŭ rekte ĉe la eldonejo.

Esperanto-Centro Paderborno
D-4790 Paderborno, Poŝtfako 1450

Jus aperis la plej nova verko de **FLÁVIO FONSECA!**



Temas pri la kasedo **AERLUMO**, majstra traduko esperanten de freŝdata kaj sukcesa naci-lingva disko de Flávio. Ĝi enhavas dek altnivelajn komponaĵojn, en kies plenumo partoprenas pli ol tridek lertaj muzikistoj! Krome, ĉiuj tekstoj kun komentoj de la aŭtoro akompanas la kasedon.

MENDU TUJ!

Ĉe via libroservo, UEA, aŭ rekte ĉe la eldoninto:

Brazila Esperanto-Ligo
Caixa Postal 11-1105,
70084 Brasília - DF, Brazilo

Prezo: 27 gld. plus sendokosto (rabato por revendistoj)

Materialoj pri la nuna uzado de la akuzativo Daniel Moirand

La libro klarigas la uzadon de la akuzativo kiel oni kutimas renkonti ĝin ĉe bone konataj kaj nuntempaj aŭtoroj. Surbaze de 43 selektitaj verkoj, ampleksantaj proksimume 6 750 paĝojn, kaj el kiuj estis ĉerpitaj centoj da ekzemploj, oni vidos kiel la akuzativo aperas.

336 paĝoj, formato DIN A5; bindita. Prezo: 34,80 gld.

Mendu ĉe via libroservo, UEA, aŭ rekte ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.



KULTURA ESPERANTO-DOMO
GRESILLON – F-49150 BAUGE
telefono : 41 89 10 34

Kulturaj Aranĝoj 1991

- 27/04–04/05: **Praktika formado de Esperanto-instruantoj**
Prezento de diversaj instru-metodoj, teoriaj kaj praktikaj konsiloj. Samtempe:
Internacia renkonto de infanoj
Kursoj, promenadoj, distraĵoj.
- 17/06–30/06: **Internacia amika renkonto**
Nedeviga programo, gvidataj konversacioj, komunaj promenadoj, ekskursoj, distraj vesperoj.
- 01/07–08/07: **Seminario por Cseh-instruado (Seminario A)**
Kurso por komencantoj, praktikado de la lingvo, ekskursoj, distraj vesperoj.
- 09/07–22/07: **Prelegoj kaj kursoj (omaĝe al Baghy kaj Kalocsay)**
“La historio de Eŭropo tra la verkoj de Baghy kaj Kalocsay.” Aliaj diverstemaj prelegoj, kursoj por diverslingva lernantaro, gvidataj konversacioj, ekskursoj, distraj vesperoj.
- 23/07–05/08: **Lernu kaj praktiku (I) – La arto traduki**
Kursoj por diverslingva lernantaro, gvidataj konversacioj, ekskursoj, distraj vesperoj.
“La arto traduki” – G. Lagrange (unu semajno).
- 06/08–19/08: **Lernu kaj praktiku (II)**
Kursoj por diverslingva lernantaro, gvidataj konversacioj, ekskursoj, distraj vesperoj.
- 20/08–02/09: **Somerfina lernejo**
Kursoj por diverslingvaj lernantoj, gvidataj konversacioj, ekskursoj, distraj vesperoj.

Pliajn detalojn oni petu al la ĉi-supra adreso.

VIKTIMOJ



Baghy pasigis ses jarojn (1914-1920) en siberiaj militkaptitejoj. Ĉi tiu lia unua romano entenas ne nur vivecajn priskribojn de la medio, de la kaptitoj, gardistoj kaj siberianoj, sed ankaŭ pasioplenan intrigon de amo kaj morto. Ĝiaj ses eldonoj ravis jam tri generaciojn de esperantistoj.

212 p. 27,00 gld.

PRETER LA VIVO

La freŝo kaj vervo de ĉi tiu debuta verko heroldis revolucion en la Esperanta literaturo. Unuafoje, aŭtoro alportis ion unikan al li mem: la amaran sperton de militkaptito, pentritan en fortaj koloroj. La voĉo de Baghy elvokis entuziasmon ne nur ĉe la kritikistoj sed ankaŭ ĉe la Esperanta publiko.

156 p. 22,50 gld.



SUR SANGA TERO

Ĉi tiu daŭrigo de la romano *Viktimoj* estas samtempe memstara verko, kiu majstre bildigas la ĥaosan kaj sangoplenan naskiĝon de la soveta ŝtato. Baghy ne hezitas malkaŝi la terurajn kruelaĵojn de tiu epoko, sed ankaŭ la momentojn de belo, ĝojo, eĉ humuro. Kiel la kaptitoj, ankaŭ la legantoj devos ekami Siberion.

256 p. 30,00 gld.

PILGRIMO

La plej bona poemaro de Baghy montras plenan teknikan maturiĝon kaj samtempe filozofian profundigon. Grandan eĥon ĉe la esperantistoj trovis liaj pacismaj kaj humanismaj ideoj, esprimitaj elokvente kaj precize. Transsentigas ankaŭ la fono de malriĉiĝinta Hungario, kie regas hipokriteco kaj maljusteco.

136 p. 22,50 gld.



Ĉiuj kvar verkoj kun analiza postparolo de Vilmos Benczik.
Mendu ĉe la Libro servo de UEA. Triona rabato ekde 3 ekz.



HEROLDO DE ESPERANTO

LA PLEJ OFTA SENDEPENDA GAZETO DE LA ESPERANTO-MOVADO
De 70 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 16 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Junulara, instruista, literatura rubrikoj, libreccenzoj, listo de fakaj artikoloj en Esperanto
- Duobla kongresa numero, kalendaro de internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj
- Libera tribuno de la legantoj, anoncetoj, ŝak-problemoj, krucvortenigmoj, foto-filmo
- Sciencaj suplementoj, ktp.

Jarabono: 22,00 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro
Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA
(43 guldenoj; aldonaj kostoj por aera sendo)

Mendu provnumeron ĉe la redakcio: Via N. Sandre 15, I-10078 Venaria Reale (TO), Italio

Redaktoro: Ada Fighiera-Sikorska